

**Redakta komitato:**

Josefo Németĥ (red.)  
Luiza Oberrauch Madella  
Rob Moerbeek

**Kunlaborantoj  
de la aktuala numero:**

Augusto Caspero  
Betty Chatterjee  
Aida Cizikaite  
Nina Daniljuk  
Eva Jager  
Dennis Keefe  
Jolanta Kieres  
Zsafia Korody  
Ilona Koutry  
Katalin Kovacs  
Geza Kunucz  
Lee Jung-kee  
Arne Olav Mjoen  
Atilio Orellana Rojas  
Aleksander Osincev  
Anna Pertus  
Mati Pertus  
Katalin Perczel-Szabó  
Radojica Petrovic  
Katarina Steele  
Wu Guojiang



**ilei**

Organo de Internacia Ligo  
de Esperantistaj Instruistoj

## ENHAVO

---

|   |    |
|---|----|
| Dennis KEEFE: <i>Lingva Festivalo – Kiel fari [...]?</i> .....                  | 4  |
| Géza KURUCZ: <i>Pri komunikado internacia</i> .....                             | 12 |
| Rob MOERBEEK: <i>Antologieto de nia originala konversacia stilo [...]</i> ..... | 17 |
| Anna kaj Mati PENTUS: <i>Ĉiamverda lernolibro [...]</i> (recenzo) .....         | 19 |
| Katarina STEELE: <i>Instruado de E-o en la lernejoj de Perto (AU)</i> .....     | 22 |
| Betty CHATTERJEE: <i>Reta renkontiĝo</i> .....                                  | 25 |
| <i>El la landoj kaj sekcioj (CN, DE, HU, IT, KR, NL, NO, PL, RU, UA)</i> .....  | 27 |
| <i>La 42-a konferenco de ILEI, Maribor, Slovenio, 2009</i> (anonco).....        | 35 |
| <i>La 41-a konf. de ILEI, Portonovo, Benino, 2008</i> (informoj, aliĝilo) ..... | 36 |

---

## ESTRARO DE LA LIGO

---

**Prezidanto:** Radojica PETROVIĆ, *Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381 32) 371053. Fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.*  
Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

**Vicprezidanto:** Zsófia KÓRÓDY, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983.*  
<zsofia.korody@esperanto.de>. Instrukapabligado kaj edukaj centroj.

**Sekretario:** Atilio ORELLANA ROJAS, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422,*  
<atilioorellanarojas@gmail.com>.

**Estrarano pri financoj:** Sjoerd BOSGA, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.*  
Administra sistemo.

**Vicsekretario:** Mihai TRIFOI, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio (+40) 267-365319, <trifoi@honoris.ro>.* Lerneja agado.

**Estrarano:** Aida ČIŽIKAITĖ, *Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio.*  
*Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>.* Konferencoj. Scienca agado.

**Estrarano:** Yas KAWAMURA, *13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio, <esperanto@d0y0b.com>.* Azia agado.

---

**La nunan numeron ni sendis al la presejo 14 novembro 2007, redaktofino por la sekva numero 15 januaro 2008.**

---

|   |
|---|
| Sur la titolpaĝo: <i>Japanio prezentis sin – la 40-a ILEI-konferenco en Ranzan, 2007 – fotoj faritaj de Michael CWIK (Belgio)</i> |
|---|

## *Scienc*a Komitato

**Prezidanto: Humphrey Tonkin**,  
Usono, University of Hartford;  
AdE<sup>1</sup>

**Vicprezidanto: Detlev Blanke**,  
Germanio, Prezidanto de la Societo  
pri Interlingvistiko

### **Membroj:**

**Vera Barandovská-Frank**,  
Germanio, Universität Paderborn,  
AIS<sup>2</sup> San Marino

**Duncan Charters**, Usono, Principia  
College, Elsah

**Renato Corsetti**, Italio, Università  
degli Studi di Roma „La Sapienza”;  
AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta**, Barato, University  
of Hyderabad; AdE<sup>1</sup>

**Michel Duc Goninaz**, Francio,  
Université de Provence; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius**, Litovio, Šiaulių  
universitetas

**Wim Jansen**, Nederlando,  
Universiteit van Amsterdam

**Boris Kolker**, Usono, AdE<sup>1</sup>

**Ilona Koutny**, Pollando/Hungario,  
Uniwersytet im. Adama  
Mickiewicza w Poznaniu; AdE<sup>1</sup>

**Mauro La Torre**, Italio, Università  
degli Studi Roma Tre

**Maria Majerczak**, Pollando, Uniwer-  
sytet Jagielloński w Krakowie

**Geraldo Mattos**, Brazilo, Federacia  
Universitato de Paranao; AdE<sup>1</sup>

**Aleksandr Melnikov**, Rusio,  
Академия Сельскохозяйственного  
Машиностроения

**Radojica Petrović**, Serbio,  
Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha**, Hungario, Magyar  
Tudományos Akadémia, Nyelv-  
tudományi Intézet

**Sekretario: Aida Čižikaitė**, Litovio,  
estranano de ILEI

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

<sup>2</sup> AIS – Akademio de la Sciencoj, San  
Marino

## **Karaj Legantoj!**

La ĉefartikolon de la nuna numero verkis Dennis KEEFE, kies naci-econ mi ne kuraĝis difini, en tiom multe da landoj li jam vivis kaj laboris...! ☺ Lia artikolo pri tio, kiel fari, ke la Lingvaj Festivaloj estu pli efikaj kaj interesaj, certe helpos al postaj organizantoj de tiuj eventoj.

La „imagita intervjuo” de Géza KURUCZ pri la internacia komunkado, pro la logika argumentado de la aŭtoro, meritas esti tradukita kaj sendita al aliaj lingvoj kaj sendo ankaŭ al la nacilingvaj revuaroj.

Nia provleganto, Rob MOER-BEEK, dum la japana konferenco kolektis por niaj „sinkorektemuloj” bukedon da frazoj kun tipaj kaj parte amuzaj eraroj de parolata E-o. Feliĉe, li proponas ankaŭ spritajn solvojn por la ĝusta korektado. Anna kaj Mati PENTUS verkis bonan recenzon pri la lernolibro de *Boris KOLKER (Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro)*. Katarina STEELE kompilis historian resumon pri la instruado de E-o en la lernejoj de Perto (AU).

La raporto de Betty CHATTER-JEE prezentas la ĉiutagajn malfacilaĵojn de E-instruisto en Maroko.

Krome en la nuna numero vi trovos ankoraŭ 13 novaĵojn el 10 landoj kaj fine de la revuo informojn + aliĝilon por niaj sekvaj konferencoj. Bonan legadon!

*Jozefo Németh, redaktoro*

**Dennis KEEFE**

## **Lingva Festivalo – Kiel fari efikajn, interesajn kursetojn por ĝenerala publiko?**

Antaŭ pli ol dek jaroj en la urbo Tours en Francio okazis la unua Lingva Festivalo (LF), kun partopreno de 32 lingvoj. Speciala nova trajto de tiu festivalo estis, ke ĉiuj el tiuj lingvoj estis instruataj. Tiu modelo de lingva prezentado forte kontrastis kun la tiel nomataj *Lingvaj Foiroj*, jam funkciantaj jardekojn antaŭe, kie la lingvoj estas prezentataj ĉe standoj aŭ en budoj, sed ne en klasĉambroj. Kun tiu nova modelo, la LF-movado rapide naskiĝis kaj etendiĝis de sia naskiĝloko en Francio al aliaj landoj kaj urboj. La esperantistoj ludis gravan rolon en tiu etendiĝo, speciale *Alexandr BLINOV*, kiu fondis la jam faman festivalon de Ĉekboksaro, kiu siavice patris aliajn LF-ojn en aliaj rusaj urboj.

Kiel dirite, la kerno de LF estas instruado de lingvoj. Sed el kio povas konsisti tiu instruado? Ĉu ĝi estu laŭ iu speciala metodo? Ĉu ĝi okazu laŭ la rekta metodo aŭ laŭ la traduka aŭ laŭ iu alia? La respondo al tiuj demandoj estas iusence tre simpla: la kursgvidanto rajtas instrui sian lingvon kiel li aŭ ŝi volas. Sed ĉu estas metodoj kaj teknikoj kiuj pli taŭgas ol aliaj? Ni memoru, ke la lingvaj kursoj de LF havas siajn specialaĵojn. Ĉiu kurseto daŭras malpli ol unu horon, ekzemple. Krom tiu mallonga daŭro, ĉeestantoj kaj la ĉeestantaro povas esti tre diversaj. En sama grupo povas ĉeesti spertaj kaj nespertaj lingvolernantoj, junaj kaj nejunaj homoj, personoj kiuj venis por lerni, kaj tiuj kiuj volas amuziĝi iomete. Krome, la nombro de la ĉeestantoj povas varii multege. En iu kurseto estas eble 10 personoj, en alia pli ol 60, kaj en alia eble nur 1 aŭ 2. Ni konsideru ankaŭ, ke la leciono de LF estas ĉiam enkonduka leciono, kaj post la fino de tiu leciono ne estas sekvo. Tiuj faktoroj: la ege mallonga daŭro de la kurseto, la varieco de la ĝelernantoj, kaj la tute ne certa nombro da ĉeestantoj, postulas, ke la enhavo de la kurso ne tro simulu tradician lingvan kurson. Do eĉ se la instruanto estas tre sperta lingvoinstruisto en lernejo, li aŭ ŝi eble devas repensi kaj refari sian instrumanieron.

Do, kiujn konsilojn mi mem donis kiam mi verkis la unuan *Manlibron por Trejnado de Instruantoj en LF* (franclingve, sed kun multe da ekzemploj en E-o) en la jaro 1995? Kaj kion mi kutime konsilas al novaj instruantoj, kaj al eĉ spertaj, profesiaj instruantoj kaj instruistoj de LF-oj? En la resto de ĉi tiu artikolo, mi priskribos modelon por la enhavo de tipa

leciono por LF. La modelo estas ege fleksebla kaj adaptiĝas al ĉiuj lingvoj ĝenerale. En mia skemo mi listigos kaj klarigos kelkajn relative devigajn erojn, kaj mi poste donos plurajn konsilojn por la nedevigaj partoj. Ni memoru, tamen, ke la ĝenerala gvidprincipo de LF estas, ke ĉiu instruanto rajtas instrui sian lingvon laŭplaĉe, kondiĉe, ke ŝi aŭ li sekvas la organizajn gvidliniojn, ekzemple, kiam komenci kaj fini la lecionon. Priskribo de tiuj organizaj gvidlinioj troviĝos en la nova *Manlibro por la Organizado de LF-oj*.

Tipa LF-leciono daŭras, por preni la ekzemplojn de la LF-oj en Usono kaj en Francio, ĉirkaŭ 40 minutojn. Dum tiuj 40 minutoj la instruanto parolas pri sia lingvo, kaj instruas kelkajn punktojn pri ĝia gramatiko. Gravus, ke estu varieco. Do, ekz., se la lingvo posedas nekonsistanta de la publiko alfabeton aŭ silabaron, gravus ke la kursgvidanto ne parolu nur pri tio. Utiligi la tutan tempon por priskribi detale nur unu parton de la lingvo ne plene kongruas kun la spirito de LF, kaj povas tedi kaj enuigi la ĉeestantaron. Do, la ĉefa gvidlinio por la organizo de la kurseto estas varieco, ke la instruanto parolu pri diversaj partoj de sia lingvo.



Dua fundamenta principo de la kurso estas, ke ĝi estu interesa al divers-nivelaj, diversaĝaj, diversinteresaj ĉeestantoj. Kurseto kiu pritraktas la teoriajn, lingvistikajn partojn de la svahila lingvo eble interesos universitatajn studentojn pri lingvistiko, sed tiu sama alirmaniero ne tiom plaĉus al alifakaj studentoj, kaj tia instruado tute konfuzus la ĝeneralan publikon, kaj endormigus la lingvoŝatantajn vojaĝemulojn! Tamen mallonga traktado de tiu sama temo povas sukcesi kun ĉiuj se poste estas aliaj partoj kiuj estas pli praktikaj, ekz., lerni diri *Bonan matenon*, *Kiel vi fartas*, *Mi amas vin* ktp.

Tria fundamenta principo rilatas la fizikan parton de via kurso. Parolu sufiĉe laŭte. Bona maniero kontroli vian laŭtecon estas inviti vian amik(in)on al via kurso kaj sidigu lin aŭ ŝin en la lasta vico de la sidlokoj. Via amik(in)o povos indiki al vi ĉu vi bone aŭdeblas aŭ ne. Ofte la publiko ne emas doni al vi tian informon. Prononcu klare, memorante ke via lingvo estas nekonata, kaj al la publiko plaĉus klare aŭdi tiujn novajn sonojn, tonojn, intonaciojn, ritmojn, akcentojn. Se vi estas profesia instruisto, vi scias, ke multfoje instruisto ne devas paroli tro klare, ĉar unu celo de normala lingvokurso estas prepari la gelemantojn por reala uzo de iu lingvo. Tamen tio ne estas la celo de LF, do parolu iom pli klare kaj iomete malrapide.

Se vi respektas la principojn de utiligo de varieco, de adaptiĝo al diversniveleco, kaj de priatento de la fizika prezentado, vi havos bonan bazon por sukcesa kurso. Nun, permesu al mi montri al vi pli detale mian skemon por la enhavo de kursetoj dum LF. En mia rekomendita kursoplano estas devigaj kaj elekteblaj partoj. Ni ekzameni tiujn devigajn partojn unue. Ili konsistas el kvar partoj: la deviga parolado de via lingvo, mallonga priskribo de la historio kaj geografio de la lingvo, la laso de tempo por demandoj fare de la ĉeestantoj, kaj mencio kie aŭ kiamaniere oni povas poste lerni vian lingvon.

Kiel dirite, unu deviga parto de la LF-leciono estas la parolado mem de via lingvo. Inter unu kaj tri minutoj vi parolas vian lingvon sentraduke. La ĉeestantoj ne komprenos tion kion vi diras, sed ne gravas. Ili volas aŭskulti vian lingvon kvazaŭ ĝi estus kanzono, muziko el alia lando. Kiam vi parolos vialingve, ili konstatos, ke estas novaj sonoj, novaj ritmoj, specialaj kvalitoj de la sonoj, kaj tiel plu. Se via LF okazas en Eŭropo kaj vi prezentas la italan dum la plejparto el la ĉeestantoj estas francoj, al ili plaĉus diveni kelkajn vortojn de la itala. Post via itala parolado, demandu ilin ĉu ili rekonis kelkajn vortojn. Sed se vi instruas la ĉinan aŭ la nepalan al eŭropaj ĉeestantoj, ili probable rekonas nenion, sed vi tamen povas demandi ilin, ĉu ili memoras unu aŭ du vortojn kiujn vi utiligis. Aŭ eble

demandu ĉu ili povas diri kio malsamas en via lingvo rilate al la ilia. Ne forgesu paroli laŭte kaj klare. Pensu iomete pri aktoro en teatro. Kiamaniere vi povas kapti atenton kaj intereson de la ĉeestantoj? Mi rekomendas, ke vi metu la kelkminutan paroladon de via lingvo en la komencon de via lingvo-prezentado. Tiu frua utiligado de la lingvo altigos ilian atenton kaj motivojn al ili priatenti la sekvon kaj lerni pli.

Dua deviga parto de via lingva leciono estas tre mallongaj komentoj pri la geografio kaj historio de via lingvo. Mi rekomendas, ke vi utiligu nur du aŭ tri minutojn por ĉi tiu parto. Pri la historio vi povas mencii, ke ĝi evoluis el tiu aŭ alia lingvo. Ekzemple, se vi instruas la rumanan lingvon, vi povas paroli pri la fakto, ke ĝi samfamilias kun la hispana, franca, itala kaj portugala lingvoj pro la samdeveno de la latina lingvo. Se vi instruas la anglan vi povas mencii la germanan influon ĉe la origino kaj la francan influon per vortoj post la jaro 1066, menciante ke la nomoj de kelkaj bestoj rilatas la germanan, ekzemple, *cow* kaj *Kuh*, *sheep* kaj *Schaaf*, *swine* kaj *Schwein*, dum la nomo de la viando de tiuj bestoj ofte rilatas la francan: *beef* kaj *boeuf*, *mutton* kaj *mouton*, *pork* kaj *porc*. Pri la geografio, menciukie oni parolas tiun lingvon nuntempe. Do la hispana instruanto povas mencii Hispanion, sed ankaŭ multajn partojn de Sudameriko krom Brazilo, grandajn urbojn en Usono, partojn de Karibujo, kaj antaŭajn koloniojn en Afriko. Eĉ vi povas mencii, ke la sefardoj, kiuj devige forlasis Hispanion en 1492, ankoraŭ parolas hispane en kelkaj partoj de Eŭropo kaj proksime de Mediteraneo.

Tria deviga parto de la kurseto okazos poste, ĉirkaŭ la fino de via prezentado. Se estas 40-minuta kurseto, ĉi tiu parto okazas post eble 30 minutoj. Estas konvene, ke vi ĉiam lasu iom da tempo por demandoj fare de la ĉeestantoj. Kaj specife, ke vi starigu la demandon al ili: “Kion vi volas diri en mia lingvo? Donu al mi vorton aŭ frazon, kaj mi skribos la tradukon mialingven sur la nigra tabulo.” En ĉi tiu parto eble iu demandos al vi pri la pluralo de via lingvo, se vi ne pli frue menciis tiun punkton. Aŭ eble pri la akuzativo, aŭ pri prepozicioj, aŭ ĉu facile lerneblas, aŭ ĉu estas kurso proksime en la urbo, aŭ ĉu la verbo ĉiam estas ĉe la fino de la frazo, ktp. Sed por daŭrigi la konkretan parton de la kurso, kuraĝigu viajn gelemantojn doni vortojn aŭ frazojn sialingve, por ke vi povu skribi ilin vialingve sur la tabulo. Tipaj demandoj povas esti: Kiel oni diras: “*I love you.*” Aŭ Kiel oni diras: “*I like to swim in the ocean.*” Viavice, vi skribos sur la tabulon: “Mi amas vin”, kaj: “Al mi plaĉas naĝi en la oceano”, ktp.

La finfina deviga parto de via leciono respondas al la demando „Kie oni povas poste lerni vian lingvon?” Tiu lasta ero de la leciono estas tre bona, natura maniero fini vian prezentadon. Kelkaj el la gelernantoj pro viaj interesaj klarigoj pri la lingvo komencas interesiĝi pri plua lernado de ĝi. Se vi mem aŭ alia homo instruas la lingvon proksimloke, vi kompreneble menciuj tion. Sed eble ne ekzistas tiaj kursoj. En tiu okazo vi povas menciuj lernolibrojn por komencantoj disponeblajn en loka biblioteko, aŭ aĉeteblajn en librovendejoj. Antaŭ via kurso vi povos serĉi lernolibrojn en la interreto, ekzemple, ĉe [www.amazon.com](http://www.amazon.com), kiu nun havas librovendejan eblon en multaj landoj. Alia bona paŝo estas fari interretan esploradon por trovi kursojn por eksterlandanoj en via lando. Tiun servon faras la Instituto Cervantes por la hispana lingvo, l'Alliance Française por la franca, la Goethe Institut por la germana, la Confucius-Instituto por la ĉina, ktp. Sed ne pensu, ke ekzistas lernejoj por nur grandaj lingvoj. Vi povas trovi kursojn por la galega kaj kataluna lingvoj en regionoj de Hispanio, ekzemple. Kaj fine, Berlitz kaj aliaj komercaj lernejoj havas grandan ofertan de multege da mondlingvoj

Ĝis nun ni iom detale rigardis la kvar rekomenditajn partojn de ĉiu lingva kurseto kiu okazas dum Lingva Festivalo, nome: du-tri-minuta parola specimeno de la lingvo, mallongaj komentoj pri ĝiaj historio kaj geografio, tempospaco sufiĉe longa, por ke la gelernantoj starigu demandojn, kaj finfine, informeto pri plua lernado de la lingvo. Antaŭ ol paroli pri ideoj por la elekteblaj partoj de via kurso, eble valoras la penon skemi laŭorde tipan lecionon kun tipaj tempodaŭroj de ĉiu parto. Tio helpas al ni pli bone kompreni la ĝustan lokon kaj bonan tempodaŭron por ĉiu elemento.

#### Ebla horaro por tipa LF-kurseto

1. Enkonduko: via lingvo parolata (2 – 3 minutojn)
2. Historio kaj geografio (3 – 5 minutojn)
3. Elektebla parto (4 – 6 minutojn)
4. Elektebla parto (4 – 6 minutojn)
5. Elektebla parto (4 – 6 minutojn)
6. (Elektebla parto (4 – 6 minutojn))
7. (Elektebla parto (4 – 6 minutojn))
8. Demandoj fare de la ĉeestantoj (7 – 9 minutojn)
9. Kie oni povas plue lerni la lingvon (1 – 2 minutojn)

#### Por 40-minuta kurso:

Devigaj partoj estas inter 13 kaj 19 minutoj. Elekteblaj partoj estas inter 21 kaj 27 minutoj.



Valoras la penon ankoraŭ unufoje ripeti ĉi tie, ke ĉiu instruanto rajtas instrui laŭ sia maniero. Tamen, mi provigis tiun skemon kun centoj da kursoj kaj centoj da instruantoj kaj en Eŭropo kaj en Usono, kun LF-oj kiuj enhavis 32, 67, 85 kaj 65 lingvojn, kaj la metodo bone kaj bele funkciis. La ĝenerala skemo sukcesis kaj por eŭropaj, kaj por aziaj, kaj por afrikaj, kaj por mortaj lingvoj, kaj eĉ por brajlo, la mansigna lingvo, kaj la morsa Kodo (kun la ŝanĝoj pri la parolata parto, kompreneble – sed eĉ tiu parto facile anstataŭigeblas: per montri de iu kiu legas brajlan libron, de iuj kiuj komunikas per manoj, kaj per iu sonbendo de reala morsa Kodo!)

Nun kion ni povas diri pri la elekteblaj partoj de la kurseto? Kion vi, kiel kursgvidanto partoprenanta en LF, prezentos? Kompreneble la elektitaj eroj multege dependas de via propra lingvo, sed en la lasta parto de ĉi tiu artikolo, mi povos doni kelkajn konsilojn kiujn mi plejparte reprenos el la unua *Manlibro por Trejnado de Instruantoj en LF*, verkita en 1995. Sed antaŭ ol elekti viajn partojn, bonvolu ne forgesi la principon de vari-eco. Klopodu montri plurajn aspektojn de via lingvo iom rapide, anstataŭ profunde kovri nur unu parton.

Gramatikaĵo – Vortordo: En multaj eŭropaj lingvoj la kutima vortordo estas SVO (subjekto – verbo – objekto). Se vi prezentas al eŭropanoj kaj via lingvo malsimilas ilin tiurilate, estus interese montri tion. La japana lingvo, ekzemple, metas la verbon ĉe la fino de la frazo. La germana povas fari simile, sed ĉefe en subfrazoj. E-o kiel la latina povas fari la ses eblajn ordojn SVO, SOV, VSO, VOS, OSV, kaj OVS. Eble, depende de la de vi instruata lingvo, vi ŝatus elekti ĉi tiun parton kiel unu el la elektebloj.

Skribsistemo: Multaj lingvoj utiligas alfabeton, aliaj silabaron, kaj aliaj ideografiaĵojn, alinomatajn ideogramoj. Montri tion al viaj gelernantoj povas esti tre interese. Tamen, ne utiligu tro da tempo, farante lecionon nur pri alfabeto, ĉar viaj gelernantoj estas tie por lerni pri pluraj interesaj aspektoj de via lingvo. Sed ofte la alfabetoj en si vekas la scivolon de viaj gelernantoj. La rusaj kaj arabaj ofte vidataj estas facile, almenaŭ parte, rapide klarigeblaj. La korea alfabeto, unuavide tute ne komprenebla, estas facile lernebla, kaj tre interesa instrutemo. Por instruistoj de la japana estas du silabaroj hiragana kaj katakana, ambaŭ menciindaj. Rimedoj por instrui la ĉinajn ideografiaĵojn meritas apartan alineon, kaj la manieroj instrui ilin estas tre variaj. Por kelkaj lingvoj estas ankaŭ interese montri ĉu ili skribiĝas de dekstre maldekstren aŭ inverse, de supre malsupren, kaj eĉ ambaŭdirekte kiel almenaŭ unu antikva lingvo.

Prononcado: Por kelkaj lingvoj vi povas rapide instrui ion pri la prononcado. (Sed, kiel por la alfabeto, atentu ke vi ne uzu tro da tempo por tio). Kelkaj afrikaj lingvoj eĉ havas fajfaĵon aŭ langoklakon kiel parton de la sonaro. Ĉu via lingvo havas neoftan sonon? Vi povas aŭdigi ĝin voĉe, kaj invitu iun imiti vin! Kelkaj lingvoj havas rigorajn regulojn por la akcento. En la ĉeĥa lingvo, se mi bone memoras, la akcento regule falas sur la unua silabo. Aliaj lingvoj utiligas tonojn. En la ĉina lingvo la samaj sonoj povas signifi ege malsamajn ideojn per apliko de alia tono. *Ma*, en la ĉina, depende de la ĉina tono por la vorto, povas esti *ĉevalo*, *patrino*, *muzo* kaj *sakri* krom utiligo por starigi demandojn. Interesa temo por la ĉeestantoj.

Ĉiutagaĵoj: Multe plaĉas al la kursetanoj eklerni kelkajn utilajn, simplajn frazojn aŭ vortojn el la ĉiutaga vivo. Kiel saluti, kiel diri sian nomon, kiel ĝisrevidi, kaj kiel esprimi ŝaton aŭ eĉ amon estas tipaj kategorioj kiuj vekos la intereson de la festivalanoj. *Bonan tagon, mi nomiĝas Johano, kiel vi fartas, ĝis revido, mi ŝatas katojn, mi amas vin* kaj aliaj similaj frazoj estas ofte notataj kaj bele enkapigataj de la gelernantoj. Parolante pri tiaj ĉiutagaĵoj, vi povas priskribi ankaŭ kiamaniere via lingvo eble malsimilas pri la preciza elekto de tiuj frazoj. Ekzemple, la simpla frazo *Kiel vi fartas?* en kutimaj eŭropaj lingvoj povas iĝi pli longa kaj kompleksa esprimo en kelkaj afrikaj lingvoj. Ne estas malofte aŭdi en partoj de Afriko: *Kiel vi fartas? ... Kaj via patro? ... Kaj via patrino? ... Kaj viaj...* (aldonu mem longan liston da familianoj kaj aliaj parencoj)? Donu ankaŭ viajn personajn spertojn. En Usono mi diras *Saluton* ĉe la komenco de konversacio, kaj ĉe la fino mi diras *Ĝis la revido*, tamen en Francio, mi faras kiel multaj francoj: mi komencas la konversacion same, kun la vorto *Saluton*, sed finas ĝin ofte per denova *Saluton*. Vi povas paroli ĉi tie ankaŭ pri nelingvaj kutimoj, la usonanoj ofte manpremas por saluti, la francoj ofte kisas trifoje, kaj la hispanoj dufoje kisas. En aliaj landoj oni devas zorge eviti eĉ la plej malgrandan tuŝeton. Kaj kiel en via lando kun via lingvo kaj kulturo? Estas tiom da belegaj diferencoj en la lingvoj, ke vi eble facile povus paroli pri tio dum la tuta leciono! Ne forgesu, tamen, la principon de varieco. Parolu pri pluraj partoj de via lingvo; ne pri nur unu.

Metodo de korpa respondo: (angle ĝi nomiĝas *TPR = Total Physical Response*). Se vi konas ĉi tiun metodon vi povas utiligi ĝin kelkajn minutojn. En mia kompleta kurso por LF, aldone al la Manlibro, mi preparos filmetojn, kiuj montras diversajn teknikojn por instrui. Tie tutcerte troviĝos ĉi tiu amuza metodo. La ideo estas simpla: vi donas u-frazon kaj la gelernantoj poste faras tion kion vi ordonas. Komprenoble, ili ne komp-

renos ĉe la unua ordono, do vi unue montre faras kune kun ili. Se estas la kurseto pri E-o, ekzemple, vi diros: *Stariĝu. Sidiĝu. Stariĝu. Sidiĝu. Levu la manon. Mallevu la manon. Stariĝu. Levu la manon. Levu la piedon. Mallevu la manon kaj piedon.* Ktp.

Kanzono: Vi povas ankaŭ kantigi la gelnantojn. Ne forgesu bone skribi la vortojn antaŭe, ĉar se ne, vi perdos tro da tempo en via kurseto. Eble vi povas uzi unu kanzonon por instrui unu aŭ du gramatikajn punktojn.

Rekta metodo: Se vi estas sperta, lerta instruisto kaj bone konas la rektan metodon, vi povas utiligi ĝin, kompreneble, eĉ por la tuta leciono. Ne forgesu, tamen, ke via celo ne estas instrui ĝisfunde la lingvon, sed montri kelkajn interesajn partojn de via lingvo. Mi mencias tion, ĉar ofte granda parto de la tempo dum rektmetoda instruado estas por praktiki unu detalon, kaj tiu praktikado povas forrabi tempon de la aliaj eroj de la kurso, kontraŭstarante la principon de varieco.

Vortfarado: Tiu temo speciale konvenas por E-leciono. Ankaŭ aliaj lingvoj havas interesan vortfaradan sistemon, kvankam ne tiel regulan. Ni pensu pri la germana kaj la turka, ekzemple. Eskimaj lingvoj povas esti interesaj tiurilate. Antaŭe oni diris, ke la eskimoj havas multege da vortoj por la koncepto *neĝo*, kaj oni uzis tiun konstaton kiel aldonan pruveton por la teorio de SAPIR kaj WHORF, ke nia lingvo multe influas nian pensmanieron. Sekvaj studoj montris tamen, ke ne estas tiom da vortoj en la eskima lingvo por neĝo: tiuj ŝajne malsimilaj vortoj fariĝas per afiksoj.

Poemo: Se vi havas mallongan, simplan poemon en via lingvo, vi povas rapide skribi ĝin, aŭ se vi havas poemon pli longan, vi povas prepari ĝin surpapere kaj distribui ĝin dum via leciono. Eventuale tiu poemeto estu sur la sama folio sur kiu vi eble metas la kompletan lecionon (vi ne estas devigata fotokopii paperon por ĉiu partoprenanto, sed multaj instruantoj trovas tiun rimedon bona). En la japana lingvo, pensu pri la famaj hajkoj, versaretoj, kiuj enhavas nur tri liniojn kaj 17 silabojn. En la angla estas tre simpla poemo, konata de ĉiuj infanoj: *Roses are red, Violets are blue, Sugar is sweet, And so are you!*

Langorompilo: Ĝi estas diable malfacile prononcebla frazo kiam ripetata rapide. Tiaj teruraj frazoj ekzistas en multaj lingvoj. Ekzemploj en la angla inkluzivas: *She sells seashells down by the seashore*, kaj *Peter Piper picked a peck of pickled peppers*. Tiu parto estus amuza ero de via leciono. Unu aŭ du minutoj sufiĉas por ridigi ĉiujn.

Aliaj elekteblaj eroj: Estas multege da aliaj ebloj por eroj kiuj konsistigas la elekteblajn partojn de via kurseto dum LF. La listo de specifaj gramatikaĵoj estus longega, se oni konsideras ĉiajn eblojn. Pli da detaloj kaj ideoj troviĝas en la ĝenerala retejo por Lingvaj Festivaloj ĉe [www.linguafest.info](http://www.linguafest.info). Por nun, prikonsideri la sekvajn: Ĉu via lingvo forigas kutime la utiligon de la verbo *esti*? Ĉu la nomoj havas genrojn kiel la germana – *die, der* aŭ *das*? Ĉu la singularo kaj pluralo estas interesa temo? Ĉu estas prepozicioj kiuj antaŭas, aŭ kontraŭe, malantaŭas la vorton kiun ili rilatas? Ĉu nombrado estas speciala? En la Guarania lingvo el Paragvajo la nombroj estas parte guaraniaj kaj parte hispanaj. Kiel blekas la bestoj povas esti amuza 4-minuta parto de via leciono! Kiel la hundoj bojas, kaj katoj miaŭas, kaj la bovinoj muĝas en via lingvo? Kiel prononciĝas kelkaj internaciaj vortoj? En la japana la anglaj vortoj *bus, hotel* kaj *beer* iĝas *basu, hoteru* kaj *biiru*.

Do, jen, la priskribo, certe nekompleta, kiamaniere fari efikan, interesan lingvan prezenton kaj instruon dum LF. Memoru, ke ĉi tiu artikolo pritraktas nur la enhavon de la kurseto mem, kaj ne ĝian interrilaton kun la ĝenerala kursaro, kiu estas alia grava temo pritraktota en la Manlibro pri LF-oj. Sciu ankaŭ, ke pri la plej grava parto de tiu leciono, tamen, mi ne parolis. Tiu grava parto estas vi, nia kara instruanto! La gelernantoj memoros multe el tio kion vi diros pri via lingvo dum viaj kelkdek minutoj da instruado, sed plej profunde impresos ilin la fakto, ke vi, volonte kaj bonkore, kundividis viajn tempon kaj sperton pri via lando, pri via kulturo, pri via lingvo kaj pri vi mem. LF estas multe pli ol lingvoj; LF estas homoj kun homoj, landanoj de nia mondo komunikantaj kun siaj frataj alilandanoj.

**Géza KURUCZ (Hungario)**

## **Pri komunikado internacia**

(imagita intervjuo)

*Por komenci jen la plej evidenta demando: ĉu komunikado internacia fakte estas problemplena?*

Por vastaj amasoj ĝi neniam estis tiel ĝena kiel nuntempe, ĉar la bezono de interpopola komunikado ĝis nun neniam estis tiel postula. Eble nur la privilegia, plej supera socia tavolo ne sentas (bedaŭrinde!) ĝin dolorige, ilin ĉirkaŭas ja arego da tradukistoj kaj interpretistoj.



*Kiom kostas (ek)havi la nunan nekontentan interkontakton?*

Precizaj elspezoj ne estas prezentablaj, ĉar adiciiĝas multaj diversaj kostoj, sed se konsideri ĉiujn kostojn de fremdlingva instruado ili preskaŭ atingas la jaran buĝeton de Eŭropa Unio. Tiu terure alta monsumo estus uzebla pli fruktodone por aliaj urĝaj farendajoj.

*Kial ne elekti iun el la naciaj lingvoj kaj proklami ĝin deviga en ĉiuj landoj paralele kun la propra nacia?*

Ĝuste tion volis kaj volas ankaŭ hodiaŭ ĉiu grandpotenco, tuj aldonante, kompreneble, ke la elektita lingvo fariĝu ĝia propra. Kaj fakte, se konsideri sole lingvajn valorojn por tiu supernacia funkcio taŭgus pluraj centoj da naciaj lingvoj.

*Kial ne decidi per ĝenerala internacia referendumo? La nacia lingvo elektita de plej multaj homoj fariĝus la internacia komunikilo.*

Ĉar la referendumo sendube rezultigus la venkon de la plej granda, influhava nacio. Ĝi ŝanĝus do nenion. Ĉiam estis tiel dum la tuta historio de la homaro.

*Sed, finfine, iam necesos decidi. Ĉiu jaro de prokrasto signifas malŝpari multajn miliardojn. Kial ne veni al findecido?*

Ĉar la decido restus nur sur papero, kiel estis ankaŭ sen papero dum pli-malpli longa superregado de tiu aŭ alia „granda lingvo” en nia historio ĝisnuna.

*Ĝuste la historio instruas al ni, ke necesas decidi, prokrastado kondukas nenien.*

Sed meti iun ajn lingvon super la aliajn estas neakceptebla, tiu decido estas ja kontraŭdemokratia. Tio donas avantaĝon nejustan al unu lingva komunumo kontraŭ ĉiuj ceteraj.

*Demokratio ne signifas, ke ĉiu estas preferata.*

Jes, sendube, sed en vera demokratio la plimulton ne povas trafi negativa distingo, kian ĝi havus ĉi-kaze. Jarmiloj pruvis, ke daŭre nenies lingvo povas esti levita super la ceterajn. Tiu strebado ĝis nun ĉiam montriĝis

malsukcesa, kaj en nia epoko de solidiĝanta demokratio des pli ĝi montriĝas tia.

*Mi ne povas konsenti, ke en tiu ĉi kampo ŝanĝo ne eblas. Ĝis nun estis tiel, sekve ankaŭ en la estonteco estos tiel same. Mi estus tre surprizita, se en nia epoko, en kiu ĉio neimageble rapide ŝanĝiĝas, la komunikado estus sola unikaĵo, kiu ne estus modifebla. Ĉu ne ekzistas eliro?*

Ekzistas, kompreneble, sed ne laŭ la tradicia vojo. Ĉi tiun gravegan funkcion povas plenumi nur neŭtrala lingvo, apartenanta al neniun nacio.

*Evidentiĝas, ke necesas revivigi iun lingvon antaŭlonge mortintan. La ĝisnunaj provoj, ŝajnas al mi, ne sukcesis. Aŭ ĉu la latina lingvo estas revivigebla?*

Kredeble ne. Pro du kaŭzoj. La unua, kaj tiu estas la pli grava: la latina ne estas vere neŭtrala, ĝi ĉiam ankoraŭ firme ligiĝas al la eklezio romkatolika, sekve aliaj tutmondaj religioj ne akceptus ĝin pro tiuj samaj kialoj, pro kiuj nenies nacia lingvo estas akceptebla. Due: ĝia alproprigado estus tre malfacila.

*Montriĝas do, ke ekzistas ununura eliro, nome: arte fari novan lingvon. Sed, ĉu eblas tiel krei lingvon?*

Eblas. Ĉiu ekzistanta lingvo estas homa produkto. Ĉiu estis kreita de longa vico da sinsekvaj generacioj dum jarmiloj, pli ĝuste, ĝi estas kreata ankaŭ hodiaŭ, ĉar ĉiu parolata lingvo senĉese ŝanĝiĝas laŭ la postuloj de la vivbezonoj.

*Sed la artefaritaj/planitaj lingvoj estas ligitaj al unu sola persono. Ĉu scipovas unu homo – eĉ supertalenta – krei tian lingvon?*

Kaj jes, kaj ne. Jes tial, ke la trunkon de la lingvo: la gramatikan strukturon kaj la afiksaron povas krei sola persono, eĉ, multe pli simplajn kaj klarajn, t.e. pli facilajn ol tiuj, kiuj estiĝis per plejparte instinkta uzado dum longaj jarcentoj. Ni ĉiuj scias, ke ĉi-lastaj estas plenplenaj de „esceptaj” formoj, kies alproprigado bezonas longan, paciencan laboron. Aliflanke, estas sendube, ke eĉ la plej talenta homo de la mondo ne scipovas krei kompletan lingvon, taŭgan por ĉiuj terenoj de vivsituaĵoj, por tio estas bezonata profesie multflanka granda komunumo.

*Tia planlingvo tucerte ne ekzistas. Kion do fari?*

Tia ne ekzistas ankoraŭ, sed tute proksima al tia jam ekzistas. Estas sciinde, ke el pli ol cent planlingvoj nur unu sola transvivis la kontroladon de la tempo.

*Ĉu ĝi estas Esperanto?*

Jes. Antaŭ cent dudek jaroj, en 1887 aperis la unua libro de Zamenhof, okulkuracisto, kiu vivis en Varsovio kaj bone konis plurajn lingvojn.

*Sed unu homo ne povas krei lingvon. Aŭ ĉu li estas escepto?*

Ne. Li ne estis tiel naiva. Li ĉiam konsideris sin nur iniciatinto, ĉar li konsciis, ke la lingvon mem povas krei nur multnacia komunumo.

*Kaj ĉu formiĝas tiu ĉi komunumo? Oni apenaŭ aŭdas pri ĝi.*

En pli ol 150 landoj (en ĉiuj kontinentoj) troviĝas homoj, parolantaj E-on, sed ili apenaŭ ricevis/as subtenon de la politikistoj, sed des pli persekutadon (Hitler, Stalin), preteran pitan malrespekton, kvankam mondfamaj verkistoj, poetoj, sciencistoj, lingvistoj esprimis/as sian pozitivan opinion pri la ideo. Grandparte eĉ hodiaŭ estas ankoraŭ misio akcepti laboron por Esperanto.

*Kaj kunveninte, ĉu ili vere komprenas sin reciproke? Ĉar tio estas la plej grava.*

Aro da faktoj pruvas, ke sur preskaŭ ĉiuj terenoj E-o kontentigas la postulojn.

*Kiuj estas la terenoj, kie ĝi ne kontentigas ilin?*

Tiuj fakterenoj, kie ankoraŭ mankas aktivaj uzantoj. Ankaŭ ĉi-terene ĝi certe taŭgus, sed la koncerna faka vortrezoro estas ankoraŭ kreota, ĝuste kiel ĉe la naciaj lingvoj ĝi ekestas danke al praktika uzado.

*Kiujn pozitivajn faktojn oni povas mencii?*

Kongresojn (ankaŭ fakajn) kaj dekduojn da diversaj turismaj, kulturaj aranĝaĵoj, grandan nombron da E-libroj, gazetoj, propran beletristikon, milojn da retpaĝoj, laŭ sia enhavo ilia vikipedio (E-lingva leksikono) troviĝas inter la unuaj dudek lingvoj, ankaŭ da E-lingvaj radioelsendoj ekzistas ĉ. dekduo.

*Kio malhelpas do la ĝeneralan akcepton de E-o, se en ĉiuj kampoj, kie funkcias la lingvo, estas sendubaj atingoj?*

Esence ekzistas du gravaj kaŭzoj. Mi konsideras la pli grava tion, ke E-o prezentas revolucie novan solvon, kia ĝis nun ne ekzistis. Rompi la tradicion de miljaroj estas terure malfacile, tio postulas longan, senlacan, paciencan agadon. Pluraj ekzemploj atestas pri tio. Sed ne forgesu, ke fine ĉiam venkas la racia, justa celado. Ankaŭ la alia kialo estas evidenta. La grandpotencoj provas malsukcesigi, kiom longe tio eblas, la ŝanĝon por ili nefavoran. Tio – kvankam ne subteninda – estas komprenebla el propra vidpunkto.

*Ne ekzistas do eliro. Tamen tiu ĉi konkludo estas tutcerte malĝusta, ĉar kiam la historia evoluo atingas la punkton, post kiu la antaŭa strukturo ne plu funkcias kontentige, tiam necesas trovi solvon, prokrasto ne kondukas al sukceso. Mi havas ankoraŭ gravan demandon, nome: Ĉu ĝenerala akcepto de neŭtrala lingvo ne rezultigos la pereon de etnaj lingvoj? La tuta mondo timas tion, ke la malgrandaj lingvoj mortos unu post la alia. La tendenco jam komenciĝis.*

E-o certe ne minacas pli ol la naciaj lingvoj celantaj akiri superregadon, sed precize antaŭvidi jarmilojn ne eblas. Estas certe, ke en mallonga distanco (tio egalas ne malpli ol unu jarcenton) ĝi efikus pozitive, ĉar okaze de ĝia akcepto restus pli da tempo kaj atento por la etnaj lingvoj kaj kulturoj, probable plej profite por tiuj, kiuj estas en danĝero.

*Kaj kiom da energio necesas por posedpreni planlingvon, nome E-on?*

Nuntempe E-o estas jam vivanta pontlingvo, miloj ellernis ĝin kiel familian lingvon. Cetere, daŭra uzado igas ĉiun lingvon vivanta. Danke al neimag-eble logikaj gramatiko kaj vortfarado, nehavantaj escepton, kaj krome, ĉar la vortrezoro baziĝas sur vortoj internaciigintaj, laŭ ĝisnunaj spertoj, esploroj k.a. ĝi estas alproprigebla en ok- ĝis dekoble malpli da tempo (ĉ. 200 horoj) ol ajna nacia lingvo.

*Tio sendube estas grandega avantaĝo. Kion aldoni ankoraŭ?*

Mi kompletigus la supre diritajn vortojn nur per tio, ke la lando(j) – mi pensas pri malgranda(j) lando(j) kun komunikada malavantaĝo – kiuj frue konsciiĝas pri la problemo, por ĝi/ili la kuraĝa decido alportos avantaĝon, eĉ profiton. Perspektiva antaŭvido ĉiam montriĝas sukcesa investado.



**Rob MOERBEEK (Nederlando)**

## **Antologieto de nia originala konversacia stilo falsigita**

Kiel trudherboj aperadas la substrataĵoj el la nacia aŭ la adorata reglingvo. Niaj lernolibroj malsufiĉe nin ekipas por povi lojali al la bona mondlingvo. Sed jen la frazoj (kompilitaj el nia komuna originala parollingvo de ĉiuj rangoj kaj klasoj), prezentitaj por sinkorektemuloj, do en la ILEI-konferenco en Ranzan 2007. Konsole sekvos solvoj (korekteblaj, mi konscias kaj atendas).

### **Mi aldonis: “falsigita” por ke ĉiu korektu eĉ tion!**

- 1) Jen importanta rimarko.
- 2) Ĉu la noticio estis konita al vi? (temis pri la vorto „gemuta”)
- 3) Bv. disponu al ni veganan manĝon.
- 4) Oni ankaŭ provizu fruktojn al ni.
- 5) Li survivis samkiel sia filino, malgraŭ suferis perskutadon.
- 6) Kial vi iras al la maljusta direkto?
- 7) La ondoj malbonigis ŝin. Kiel vi estas nun?
- 8) Li ricevis leteron postulanta sian sinmortigon.
- 9) En duono da horo ni ne finiĝos, ĉar tuj komencos novaj proponoj.
- 10) Multaj de ni portas nobelulajn nomojn.
- 11) Donu al ni ĉanson paroli kun la portugaliano.
- 12) Se mi estas permesata preni someran ferion, mi povas ebligi vin profiti mian gastemecon.
- 13) Al kiu mi ĵetos la pilkon? (en embaraso, kiam subite pilko alflugis kaj pene kaptiĝis.)
- 14) Ni devas interesigi la homojn al Esperanto.
- 15) Bv ne obstrukcii la vojon al la policio.
- 16) Ni devas translokigi la televidon.
- 17) Des pli da ciferoj des pli nia akurateco malpliigas.
- 18) Mi venis por plezuri vin, infanojn!
- 19) Se vi falsigos la kuponojn, vi venenigos la etoson.
- 20) Se lernanto batas iun de la alia sekso, ĉu ni tiun punu, donu al tiu prelegon aŭ forprenu de tiu la rajton plu partopreni la lecionojn aŭ ĉu tiu rajtas sin pravigi sen ke ties nomo estus enskribita en la nigra libro? (Ni diskutis pri la dubinda „ŝli”.)
- 21) La blankuloj venis por koloniigi niajn prateritoriojn.
- 22) Kaj nun ni devas halti la paroladon.

- 23) Ni komenciĝu kun zero.
- 24) Bonan duŝon al vi, Wim! (al mia samĉambrano)
- 25) Estis emociiga sonĝo (de l'homaro).
- 26) Mi ne aŭdis vin pri kion vi intencis fari.
- 27) Mi deziras helpi por ke vi povas paroli senerare.

### **Solvoproponoj. Sed mi malfermos la orelojn por viaj komentoj.**

- 1) Jen grava rimarkigo!
- 2) Ĉu vi konas la nocion? (Ĉu la nocio estas konata de vi?)
- 3) Bv (Bonvolu) disponigi al ni veganan manĝon.
- 4) Oni provizu nin ankaŭ per fruktoj.
- 5) Samkiel lia fratino (!) li postvivis, kvankam ili suferis persekutadon.
- 6) Kial vi iras en la malĝusta (malbona) direkto?
- 7) La ondoj ŝin malbonfartigas. Kiel vi fartas nun? (Kia vi sentas vin nun?)
- 8) Li ricevis leteron postulantan lian memmortigon.
- 9) En duonhoro (En duono de horo) ni ne finos, ĉar tuj komenciĝos novaj proponoj.
- 10) Multaj el ni havas nobelan nomon.
- 11) Donu al ni ŝancon paroli kun la portugalo.
- 12) Se oni permesos al mi preni somerajn feriojn (se estos permesite al mi), mi povus ebligi al vi profiti de mia gastamo (ĝui mian gastamon).
- 13) Al kiu mi ĵetu la pilkon?
- 14) Ni devas interesigi E-on al la homoj/interesi la homojn pri E-o.
- 15) Bv. ne obstrukci la vojon al la polico.
- 16) Ni devas transloki la televidilon.
- 17) Ju pli da ciferoj, des malpliĝas nia precizeco. (akurata signifas nur „ĝustatempa”)
- 18) Mi venis vin plezurigi, infanoj!
- 19) Se vi falsos la kuponojn, vi venenos la etoson.
- 20) Se lernanto batas iun de la alia sekso, ĉu ni tiun punu, donu al li aŭ ŝi prelegon aŭ forprenu de la kulpulo la rajton plu partopreni en la lecionoj aŭ ĉu la koncernato rajtus sin pravigi sen ke la nomo estus enskribita en la nigra libro?
- 21) La blankuloj venis kolonii niajn prateritoriojn.
- 22) Kaj nun ni devas haltigi (ĉesigi) la paroladon.
- 23) Ni komencu de nulo (per nulo).
- 24) Bonan duŝiĝon al vi, Wim!

- 25) Estis emocia sonĝo. (Eĉ tiu de la homaro okazis en „densa mallumo”, do nokte: ne temas pri revo!)
- 26) Mi ne aŭdis de vi, kion vi intencas fari (regulo de la nereakta parolo!)
- 27) Mi deziras helpi, (por) ke vi povu paroli senerare!

### Anna kaj Mati PENTUS (Rusio)

## Ĉiamverda lernolibro, aŭ ankaŭ komencantoj povas vojaĝi en Esperanto-lando (recenzo)

*Boris KOLKER. Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro. — Eld. Impeto. Moskvo, 2007, 264 p. ISBN 978-5-7161-0172-2*



Ni ne scias, pro kiu kialo homo decidas lerni fremdan lingvon. Sed, verŝajne, la unua afero, pri kiu ĉiu studonto okupiĝas, estas serĉado de bona lernolibro. Malgraŭ tio, ke interreto disponigas multajn studmaterialojn, oni ofte preferas malnovan bonan paperan libron. Ĝis antaŭ nelonge libro, kiun povis trovi rusparolanto por lerni E-on, vere estis malnova. Pli precize, oni ja eldonis kelkajn libretojn, sed ili estis tro malgrandaj por serioze lerni la lingvon. Do, lernontoj estis devigataj ĝoji pri akiritaj brokantaĵoj.

Feliĉe, la hodiaŭaj komencantoj en Rusio ne plu havas lernolibroproblemon, ĉar la moskva eldonejo „Impeto” aperigis renovigitan lernilon „Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro” de *Boris*

*KOLKER*, membro de AdE. Multaj konas lian brilan verkon „Vojaĝo en E-lando”, sed rusparolantoj povis ĝui ankaŭ lian malnovan bazan lernolibron.

Tiu kurso por komencantoj havas longan historion. La aŭtoro komencis labori super ĝi en 1972. En 1973 tiu ĉi kurso estis publikigita en Ufa en regiona ĵurnalo „Leninec” (Leninano). La unua broŝura varianto aperis en Ufa en 1974 sub la titolo „Internacia lingvo E-o. Metodikaj rekomendoj kaj kontroltaskoj por la kurso”. Poste tiu lernolibro estis multfoje reaperigita en multaj urboj de Sovet-Unio kaj estis tradukita en la estonan. En 1992 la plej granda rusa scienca eldonejo „Nauka” (Scienco) eldonis la lernolibron oficiale. La eldonkvanto impresas: 10 500 ekzempleroj! Kuriozaĵo estas, ke pri la libro okupiĝis la redakcio pri la orienta literaturo. Jam la unua libro-forma eldono de la nun modernigita lernolibro estis bonega. Multaj esperantistoj en Sovet-Unio konatiĝis kun E-o per ĝi kaj poste rekomendis ĝin al siaj konatoj.

La lernolibro konsistas el 20 lecionoj. Tipa leciono komenciĝas per vortlisto. Ĉiuj scias, ke la elektado de vortoj kaj la kompilado de porlecionaj vortlistoj estas tre malfacila kaj tre grava tasko, ja eĉ en la unuaj lecionoj lernanto deziras legi sencohavajn frazojn. En la komenco de tiu ĉi kurso la aŭtoro apogas sin sur vortoj, kiujn rusparolanto kapablas kompreni sen traduko (plejparte surbaze de internacia leksiko). Sed ĉe la fino de la kurso lernantoj konas jam ĉirkaŭ 1200 radikojn. La leksikan parton sekvas la teoria, enhavanta materialon en la rusa lingvo pri gramatiko, vortfarado kaj vortuzado, kun multaj ilustraj ekzemploj. La aŭtoro elegante tuŝas eĉ malfacilajn gramatikaĵojn. Ĉiu leciono enhavas E-tekston (lecionoj 3-13 – dialogoj pri ĉiutagaj temoj; lecionoj 14-20 – tekstoj pri E-temoj), kiun la lernanto devas traduki rusen, kaj kvin aŭ ses ekzercojn. En la unua ekzerco oni tradukas la E-vortojn en la rusan por memorfiksi radikojn kaj alkutimiĝi al afiksoj. En la dua ekzerco necesas traduki ofte uzatajn E-vortkunojn rusen. Tiuj vortkunoj estas ligitaj kun la leciona teksto en E-o kaj la traduktasko en la fino de la leciono. La trian ekzercon konsistigas frazoj, tradukendaj en la rusan. Tie la aŭtoro kolektis titolojn kaj citaĵojn el konataj beletraĵoj, aforismojn, eldirojn de famaj personoj, proverbojn, agitfrazojn, gratulojn ktp, kiujn la lernanto plej verŝajne konas ruslingve. Tiu scio helpas al li, unue, traduki kaj, due, kompreni, ke oni tradukas ne vortojn, sed sencon. En la sekva tasko oni tradukas frazojn aŭ mallongan tekston, ligitan kun la unua teksto de la leciono, en E-on. En la lasta tasko la aŭtoro proponas al la lernanto temon aŭ situacion por verki E-lingvan dialogon aŭ rakonton.

Post la ekzercoj en ĉiu leciono troviĝas kadro kun aŭtora alparolo. Jen ĝi temas pri atingitaj rezultoj, jen enhavas konsilojn pri studado, jen kuraĝigas

la leganton, jen atentigas pri malfacilaĵoj, jen konatigas kun la E-medio. Interalie, la ĉeesto de la aŭtoro sentiĝas ankaŭ en aliaj etaj detaloj: ie li priskribas siajn amatajn lokojn, ie kvazaŭ mem rakontas pri evento, ie citas trafikajn eldirojn de siaj konatoj... Lecionfine estas vortludo kaj kelkaj ruslingvaj priesperantaj tekstoj. En la lastaj 5 lecionoj (kiuj fakte estas meznivela kurso) lernantoj tradukas nur Esperanten: en la unua ekzerco – afiksitaĵoj kaj kunmetitajn vortojn, en la dua - vortkunojn, en la tria – specialajn frazojn, atentante emfazitajn elementojn (ekzemple, apartan kazon de la rusa lingvo aŭ rusajn homonimojn). En la kvara ekzerco necesas traduki en E-on tutan tekston kaj en la lasta, krea, verki propran rakonton laŭ proponita temo. La libro entenas ankaŭ malgrandan E-rusan vortaron kaj respondojn al la unuaj taskoj de la lecionoj.

Bezonon de modernigo kaŭzis drastaj ŝanĝoj en Rusio, koncernantaj kaj la politikan situacion, kaj la ĉiutagan vivon. La libroj, eldonitaj en Sovet-Unio, estis iom ideologiigitaj, sed nun mencioj pri partia kongreso kaj kolĥoza ŝoforo ridetigas la legantojn. Certe, matenmanĝo en studenta bufedejo kostas nun multe pli ol 50 kopekojn kaj oni nun rigardas en vendejoj ne skribmaŝinojn, sed komputilojn. Grave renovigitaj estas ankaŭ la postlecionaj informaj tekstoj. Ili iĝis pli diversaj, ankoraŭ pli interesaj, pli modernaj, pli surprizaj: oficialaj dokumentoj kaj informo pri E-geografiaĵoj, eltiraĵoj el interlingvistikaj disertacioj kaj intervjuo kun *Harry HARRISON*, impresoj de e-isto pri ruslingva beletra libro, en kiu agas Zamenhof mem, kaj artikolo pri *Pasporta Servo*. Utila aldono estas la indekso de gramatikaĵoj, helpanta rapide trovi la koncernan lecionon, kiam necesas rememori iun klarigon. Estas pliampleksigita la listo de E-mallongigoj en unu el la lecionoj. Unue, certe, oni devas koni ilin por kompreni E-tekstojn. Due, sen helpo multaj e-istoj ne povas ĝuste traduki la siglojn „UEA” kaj „UK” en la gepatran lingvon!

Post la trastudado de la baza kurso antaŭ ĉiu lernanto aperas la demando, kion fari nun. Por instigi al plia studado, la renovigita lernolibro inkludas la unuan lecionon el la perfektiga kurso de Boris KOLKER „Vojaĝo en E-lando” kun ruslingva traduko. Al ni tre plaĉas la belaspekta kaj atentokapta kovrilo de la libro (de la grafikisto V. Te) kun bukedo el E-literoj. Bela kaj sencoplana! La kurson oni povas uzi por memstara studado aŭ por E-kursoj, gvidataj de instruistoj. Kaj bonŝance instruistoj jam atendas gelernantojn ĉe la koresponda E-kurso por ruslingvanoj, funkcia laŭ tiu ĉi lernilo ekde 1999 (nun ĉe la servilo „Yahoo! Groups”, <http://groups.yahoo.com/group/esperanto-kurso/>).


Multaj e-istoj en Rusio konas la unuan eldonon de la lernolibro de Boris KOLKER, konsiderante ĝin nesimpla, tamen tre utila kaj cerbumiganta. Ni certas, ke la nova pli granda e-ista generacio en Rusio varme akceptos la novan eldonon. La E-lingvaj tekstoj kaj ekzercoj de tiu neordinara lernolibro povas esti utilaj ankaŭ por personoj, kiuj ne scias la rusan lingvon.

**Katarina STEELE**

## **Instruado de Esperanto en la lernejoj de Perto (AU)**

### **La komenco – Idyss EINIHOVICI**

Ŝi estis rumandevena aŭstralianino, kiu ege fervore propagandis E-on. Pri sia ideo instrui la lingvon en elementaj lernejoj ŝi sukcesis persvadi kelkajn lernejestrojn de la tielnomataj Montessori-lernejoj, kies celoj kaj metodoj malsamas de la „ordinaraj” ŝtataj lernejoj kaj kiuj estas pli malfermitaj al bonaj, sed nekutimaj edukaj ideoj.



### **Trevor**

En 1996, invitate de la bonhava *Idyss*, venis al Perto *Trevor STEELE*. Pagite de *Idyss* li instruis E-on en 3 Montessori-lernejoj: Fremantle, Riverlands kaj Perth. Temis pri granda kvanto de lernantoj 3- ĝis 12-jaraj, kiuj ricevis dum 10 monatoj ĉiusemajne po 1 lecionon 15-30-minutan. Trevor instruis E-on ankaŭ al sia koleginino *Sheryl RIDOUT*.

### **Sheryl RIDOUT**

Post la foriro de *Trevor* en la Pert-a Montessori-lernejo transprenis la instruadon de E-o *Sheryl RIDOUT*.

Ŝi aktivis proksimume de la komenco de la 4-a instru-jarkvarono de 1997 ĝis la fino de 1999 kaj instruis entute proksimume 50 infanojn.



### **Patricia O'CONNOR**

La elementa lernejo Deanmore estas unu el la Pertaj lernejoj, en kiuj okazas speciala instruado al aparte interesataj kaj talentaj infanoj. Kadre de ĝia programo *Patricia* gvidis 9-semajnan kurson en junio-aŭgusto de 1999, titolitan „Esperanto kaj arto”. La instruado okazis po du horoj semajne kaj partoprenis ĝin 16 lernantoj 8-12-jaraj.

En la Perth-a Montessori-lernejo ŝi instruis E-on dum la lerneja jaro de 2000. Ĉiusemajne 1 lecionon ricevis entute proksimume 60 infanoj.

Aparta aktivaĵo de *Patricia* estis la preparo kaj prezento de ses 30-minutaj E-lecionoj por komencantoj, kiuj estis prezentitaj al la ĝenerala publiko posemajne en februaro-marto de 2000 per la televida Kanalo 31 Perth kaj Kanalo 31 NSW (Nov-Sudkimrio). La filmado okazis kadre de la instru-programo por la triagrada edukado.

### **Penelope VOS**

En 1997 *Penny* estis vic-estrino de sendependa, alternativa mezlernejo Foothills, kies estraro decidis enkonduki la instruadon de E-o. *Penny*



volontulis lerni kaj instrui E-on preskaŭ samtempe kaj la programo komenciĝis. Ĝiajn financajn kondiĉojn certigis denove *Idyss EINHOFICI*.

Dum 1997-99 E-o estis deviga lernobjekto en la 8-a klaso, kaj elektebla en la aliaj kaj lernis ĝin entute 50-80 infanoj. Interalie la lernantoj ĝuis la per-komputilan korespondadon kun la Svislanda klaso de *Vera ZASLAWSKY*.

En 2000 Penny ekinstruis E-on en 2 klasoj de la Treetops-lernejo. E-o iĝis tie parto de la normala studtemaro en 2001 kaj tiel restis ankaŭ en la sekva jaro. Tiamaniere ĉiujare lernis la lingvon proksimume 150 lernejoj.

### ***Treetops***

La aktuala direktorino de ĉi tiu Montessori-lernejo, *Carol BRANDS*, estas sendependa pensulo al kiu imponas la logiko kaj justeco de E-o. E-o estas lingvo servanta la pacon – ankaŭ tio kongruas kun la Montessori-filozofio. Ĝi estas pli facile lernebla ol la aliaj lingvoj, havas propedeŭtikajn valorojn ktp. Pri tio ĉio paroladas *Carol* preskaŭ de 10 jaroj al la gepatroj, kiuj volas enskribigi siajn infanojn al la lernejo.

## Saani BENNETTS

En 2003 *Penny* foriris el Perto. Ŝian laboron transprenis la juna instruistino Saani, kiu restis en la lernejo ĝis 2005. Ŝi instruis E-on al diversaĝaj lernantoj po unu lecionon semajne.

En 2005 Aŭstralia E-Asocio per speciala fonduso ebligis al 5 junaj Pertaj instruistinoj partopreni la 2-semajnan E-somerkursaron en Adelajdo. Unu el ili estis ĝuste *Saani*. Venis ankaŭ ŝia koleginino *Merradean PETTIT*, kiu tiam nur komencis la lernadon de E-o. *Saani* decidis organizi por siaj E-lernantoj vojaĝon al eksterlando – al la fora Svislando.



### *Vojaĝo al Svislando*

En 2005 venis al la lernejo Treetops letero de *Vera ZASLAWSKY* el La Chaux-de-Fonds, Svislando. Ŝi estis estrino de la privata lernejo *Le grande orse* (La granda urso) kun 25-30 lernantoj, kiuj lernis, interalie, E-on. *Vera* invitis la aŭstraliajn infanojn al vizito en Svislando. La infanoj el la du lernejoj komencis korespondi kaj *Saani* kun la helpo de *Merradean PETTIT*, nomata nur *Mo*, ekis la monkolektadon. La subteno venis de Aŭstralia E-Asocio (AEA), de E-ligo de Okcidenta Aŭstralio (ELWA) kaj de la Montessori-lernejo Treetops mem.

En oktobro de 2005 naŭ 10-13-jaraj E-lernantoj el la Pert-a Treetops-lernejo pasigis 2 kaj duonan semajnojn en Svislando. Gvidis ilin *Saani* kaj *Mo*. – “La infanoj bone intermiksiĝis. Ĉar la svisoj ne parolis la anglan kaj la aŭstralianoj konis nek la francan, nek la germanan, ili devis uzi E-on. Komence estis por ĉiu malfacile, sed ĝis la fino de la 2-a semajno ilia memfido multe kreskis. Niaj etuloj revenis al Aŭstralio plenaj de entuziasmo pri E-o kaj per ĝi ili infektis ankaŭ tiujn, kiuj restis hejme. Iliaj rakontoj pri la travivaĵoj ege motivigis la aliajn al la lernado.” – diris *Saani*.



### **Merradean – MO**

Post 3 jaroj de E-instruado en Treetops *Saani* forlasis la lernejon. Ŝian rolon transprenis *Mo*. *Mo* uzas por la instruado la ŝtatan programon „Language teachers curriculum” (Instruprogramo de lingvo-instruistoj). Ĝi estas deviga, sed servas nur kiel framo. En la Montessori-lernejoj oni substrekas la instruadon laŭ la individuaj ritmoj de la infanoj, do ne ĉiu faras samtempe la saman taskon.



Pasintjare (2006) en Treetops lernis E-on 150 lernantoj 4-15-jaraj. Ili havis po unu 45-60-minutan lecionon semajne. De ĉi tiu jaro la lernejo alprenis la instruadon de 16-18-jaraj geknaboj. Kadre de la programo „Internacia bakalaŭreco” oni instruas al ili la hispanan. Sed *Mo* havas alian ideon: kial ne E-on? Por lerni nian lingvon per „Internacia bakalaŭreco” necesas, ke tutmonde lernu ĝin almenaŭ 200 lernantoj.

*Mo* sukcesis venigi grupon de siaj E-lernantoj al la ĉi-jara Aŭstralia Somerkursaro en Tasmanio. Inter Perto kaj Hobarto estas granda distanco kaj du semajnoj kostas ne malmulte. La helpo venis denove de AEA (ĝi pagis la loĝadon, manĝadon, kurskotizon de la infanoj), ELWA (donis po 250 AUD por la vojaĝkostoj de infanoj) kaj de Treetops mem (pagis la elspezojn de la instruistino).

### **Fino?**

Evidente ne, la E-instruado ja daŭras kaj *Mo* kun *Saani* jam planas novan E-vojaĝon. Ni esperu legi pri ĝi en la baldaŭa estonto kaj pri la lerneja E-instruado en Perto ankoraŭ dum multaj jaroj.

## **Betty CHATTERJEE (Danio)**

### **Reta renkontiĝo**

Antaŭ naŭ monatoj pere de Skype mi konatiĝis kun esperantisto de Maroko. Li ne konas aliajn samideanojn en sia regiono, li mem lernis la lingvon pere de koresponda kurso kaj li povas praktiki la lingvon nur pere de la retaj kontaktoj. Ekde tiam ni sufiĉe ofte interkorespondas. Iom post iom pro la evoluo de nia reciproka konfideco li jam rivelas al mi mirindan bildon pri siaj lando, kulturo, ĉiutaga vivo kaj pri sia fervora amo por E-o. Li mem ne posedas komputilon; li devas piediri 8 kilometrojn al la bushaltejo por poste veturi 26 kilometrojn al la plej proksima urbo, Beni Tajjit, en kiu troviĝas retejo. Mia retamiko nomiĝas *Boughoud Si Abdelkrim*, sed li simple subskribas siajn mesaĝojn kiel *Karim*. Li naskiĝis kaj loĝas en la berbera vilaĝeto *Ait Sbaa Elkadima*, kiu situas en la



Atlas-montaro proksime al la Alĝeria limo. En la vilaĝeto loĝas ducento da homoj, 70%-oj el ili estas virinoj, maljunuloj kaj infanoj. La viroj laboras en urbejoj, nur tie ili povas trovi laboron. Karim estas instruisto en tiu ĉi vilaĝeto, kaj li sola havas la respondecon pri la tuta lernantaro, kiu nombras 10 infanojn de diversaj aĝoj kaj kapablecoj.

La ĉiutaga vivo en lia vilaĝo estas tute malsimila al mia urba vivo. Tie la homoj loĝas en domoj konstruitaj de sabloŝtono. Matene kaj vespere la junulinoj ĉerpas akvon el la vilaĝa akvo-tenejo, kaj tie la virinoj komune lavas la vestaĵojn. Ĉe mi la malbona vetero estas nur malagrabla, sed ĉe ili tiu povus signifi ekonomian katastrofon; ekzemple la 11-an de marto ĉi-jare li skribis: „Merkredon violenta vento trapasis mian vilaĝon, ĝi damaĝis multajn arbojn en nia ĝardeno, ni perdis 15 grandajn olivoarbojn.” (Pro la treege malrapida kreskado de olivoarbo, dum kiom da jaroj mankos al ili la 15 arboj?) Kiel mi antaŭe menciis Ait Sbaa Elkadima estas berbera vilaĝo, kaj *Karim* fieras pri sia kulturo kaj sia berbera lingvo. En unu el siaj unuaj mesaĝoj, li sendis al mi foton pri malnova domo en la vilaĝo skribante la jenon: „La foto estas pri la enirejo de nia malnova domo. En la fundo de la strato oni trovas ĉambro de miaj pragepatroj (pli ol 400 jarojn aĝan). Dum la kolonia periodo la franca armeo detruis nian vilaĝon post batalo sur la maroka-alĝeria limo, kaj restas nur nia ĉambro, la ĉambro de nia najbaro kaj la praavaj tomboj de la vilaĝanoj.” En sia propra vivo li jam spertis la sekvojn de la fremda influo. Hejme oni parolas nur la berberan, kaj la patrino neniam mem lernis la araban. Li skribis: „Kiam mi estis infano, mi parolis nur la berberan lingvon, kaj en la bazlernejo mi devis scii paroli la popolan araban kun la instruisto, plue la oficialan araban kaj la francan. Kio okazis? Finfine multaj el miaj amikoj forlasis la lernejon, ĉar ili ne povis lerni kvar lingvojn dum du jaroj. La araba instruisto frapis min, se mi parolis la berberan...”. Li komencis la mezlernejon en Beni Tajjit – kiu estas araba urbo – kune kun 33 aliaj berberaj infanoj, li estis la nura el ili,



kiu finis la lernejon. Laŭ lia opinio la kialoj de iliaj malsukcesoj estis ĉefe pro la kultura malestimo de la instruistoj, kiujn la lernantoj spertis en tiu ĉi lernejo. Tamen, spite al la malfeliĉaj spertoj, li nek malamas siajn arabajn samlandanojn, nek malestimas iliajn tradiciojn. Nun li mem estas instruisto kaj li alte taksas siajn berberajn lingvon

kaj kulturon, kiujn li dividas kun siaj lernantoj. *Karim* egale estimas E-on. Antaŭ du monatoj li komencis instrui E-on al siaj lernantoj; E-o signifas al li la esperon por la estonteco, ne nur por li mem, sed ankaŭ por la infanoj. Li skribis: „Kial ni lernas kvar aŭ kvin lingvojn? Kial ni perdas la tempon lerni tiom da lingvoj? Feliĉe estas tiel, ke ni nun havas facilan lingvon, kiu estas E-o. Miaj lernantoj diras, ke ĝi estas pli facila ol la franca aŭ la araba. Mi pensas, ke la mondo fariĝos pli bona pere de E-o. Pere de multaj lingvoj ni perdas niajn kulturon kaj tradiciojn.”

*Boughoud Si Abdelkrim* kaj la infanoj en tiu ĉi vilaĝo meritas nian apogon, pro tio mi verkis tiun ĉi artikolon. Li unuope bataladas por konservi sian kulturon. Kiel vi apogu ilin? Tre plaĉus al *Karim* kaj liaj lernantoj, se vi sendus al ili kuraĝigajn leterojn kaj poŝtkartojn. Jen lia adreso:

*Si Abdelkrim Boughoud, Ait Sbaa Elkadima, CP/61100, Beni Tajjit, Maroko, www.boughoud.blogspot.com, <boughoud6@hotmail.com>.*

## El la landoj kaj sekcioj...

### Ĉinio

A) 27 septembro okazis prelego fare de *Augusto CASQUERO* en la ĉina urbo Foshan, en la „Faklernejo pri Aŭtomobila Meĥaniko”, pri E-o en E-o, kun samtempa tradukado al la ĉina lingvo de la Ĝenerala Sekretario de la E-asocio de Kantono, s-ro *LIU WEIZHUAN*. Ĉ. 200 junaj gelernantoj partoprenis la prelegon, montrante grandan interesiĝon. Krom la prelego mem ili povis rigardi la videofilmon en la internacia lingvo "Ie en Ĉinio", de *Roman*



*DOBZYŃSKI*, kaj muzikan videon de koncerto de Jomo en Pollando. Fine de la prelego la partoprenintoj havis eblecon rigardi diversajn e-librojn kaj gazetojn. Vidante la entuziasmon de la gelernantoj oni proponis al la ĉeestantoj partopreni kurson de E-o, ideo kiu tuj estis akceptita de la respondeculoj de la lernejo kaj de la lernantaro. Entute aliĝis ĉ. 50 gelernantoj.

*Augusto CASQUERO*

B) 17 oktobro 2007 okdek kvin studentoj el Shenyang-Muzika Universitato elektis E-on kiel nedevidan studobjekton kaj lernas ĝin en du kursoj. La uzata lernolibro estas "E-Kurso de La Nova Jarcento", la du kursojn gvidas f-ino *MU CHUNLEI*. Ŝia instru-metodo nomata reciproka movado estas tre ŝatata de la studentoj. La reciproka movado signifas, ke parto de la lecionoj estas aranĝata ekster la klasoĉambro, la studentoj unue faras demandojn pri la ĉirkaŭaĵo, poste la instruistino instruas ilin kiel esprimi la demandojn kaj respondojn en Esperanto.

*WU GUOJIANG, vicprez. de LEA*

## Germanio

Telegramstilo pri gravaj eventoj, kiuj **estis** en Herzberg – la Esperanto-urbo:

1. Internacia metodika semajno por intensa klerigado, trejnado de instruemuloj en junio kun *Katalin KOVÁTS* kaj *Sylvain LELARGE* (*edukado.net*). Nepre rekomendinda, kaj daŭrigenda en 2008!

2. Dusemajna kunlernado de ĝemelurbaj infanoj (Somera Arbara Lernejo). Tre efika kaj daŭrigota en aŭgusto 2008.

3. Pedagogiaj Tagoj (Torpedo-3) komence de oktobro: jam tradicia fakkunveno, spertinterŝanĝo, ĉi-jare kun altnivele realigita speciala kurso de *Stefan MACGILL*. Aliaj ĉefprelegantoj: *Chuck SMITH*, *Gerald TUCKER* (trejn-sesio por ekzamenantoj), ...kaj kiuj **estos**:

1. Lingvokursoj en 3 niveloj (30.11-02.12.2007)

2. Studsesio (14-16.12.2007): Interlingvistikaj prelegoj de *Detlev BLANKE*, Zamenhof-festo.

3. ILEI-ekzameno elementa dum Internacia Seminario (IS, 28.12-03.01.08)

*Zsófia KÓRÓDY*

## Hungario

A) 15-16 septembro 2007 en la urbo Nyíregyháza (orienta parto de Hungario) oni organizis metodikan seminarion por instruistoj. Temas pri serio de trejnseminarioj, organizataj en diversaj hungaraj urboj. (Ĝin kunorganizis du regionaj E-fondaĵoj kaj du E-asocioj.) La seminarion partoprenis 12 E-instruistoj kaj pluraj aliaj gastoj, ekz. el la urboj Budapeŝt,



Szeged, Szolnok, Tiszafüred kaj Zalaegerszeg. Krom la interŝanĝo de instruspertoj oni povis ĝui la spritajn prelegojn de *Imre SZABÓ* kaj *Attila SALGA*.  
*laŭ informoj de Éva JÁGER*



B) En la Bazlernejo Szent István Király, en vilaĝo Szentkirályszabadja, de oktobro 2007 funkcias E-instruado de infanoj kun gvido de s-ino *PERCZEL-SZABÓ Katalin*. La kurso estas nedeviga fakrondo. Ĝin frekventas 22 infanoj el la 4-a, 5-a, 6-a kaj 7-a klasoj. Ili partoprenas en la programo "Springboard". Ili uzas ankoraŭ la lernolibron Okulo de Stefan MacGill. La infanoj estas entuziasmaj, kaj volonte kontaktus komencantajn klasojn.

*PERCZEL-SZABÓ Katalin,*  
<kankalin76@freemail.hu>

## Italio

„Eŭropo: multaj lingvoj por komuna lando” estis la frapfrazo de la 74-a Itala Kongreso de Esperanto (Pisa, 31 aŭg. – 7 sept. 2007).



Okazis ankaŭ serio de seminarioj kaj kursoj, dum tri tagoj:

- Kurso por komencantoj (*Kristin TYTGAT*),
- Kurso por progresantoj (*Katalin KOVÁTS*),
- Seminario pri instruado (*Paul GUBBINS*),
- Seminario pri literaturo (*Baldur RAGNARSSON*, *Mauro NERVI*, *Nicola RUGGIERO* kaj *Nicola MINNAJA*). La tuton organizis kaj reĝisoris *Nicola MINNAJA*.

## Koreio

En la dua semestro de koreaj universitatoj, 334 gestudentoj aliĝis al la kursoj de E-o, kiuj komenciĝis de aprilo en la universitatoj Korea fremdlingva (Seulo kaj Yongin), Dankook (Seulo kaj Chonan) kaj Wonkwang (Iksan). La aliĝintaj studentoj lernos E-on dum 16 semajnoj po du horoj semajne kaj ili gajnos du notojn oficiale. La studentoj de tempo al tempo provos paroli Esperante kun nekoreaj esperantistoj en Skajpo, reta komunikilo dum lecionoj. Via bonvola reago donos grandan motivon al la studentoj. Jen estas la Skajpo-adreso de la docento *LEE Jung-kee*, kiu instruas en la tri universitatoj: *leejungkee*.

*informis: LEE Jung-kee, <esperanto@saluton.net>*

## Nederlando

Doktoriĝis en la Universitato de Amsterdamo la iama estrarano de Esperanto Nederland kaj de Internacia E-Instituto (IEI) *Wim JANSEN*, docento pri interlingvistiko kaj E-o en tiu sama universitato. Por atingi tiun ĉi rezulton Jansen faris esploron pri vortordaj aspektoj troveblaj en la

nuntempa, ĵurnalismeca lingvaĵo kaj publikigis pri tio disertacion, kiun li sukcese defendis la 2-an de oktobro. La doktorigaj akompanantoj estis la profesoroj *HENGEVELD* (por la ĝenerallingvistika parto) kaj *VAN OOSTENDORP* (por la ĝenerallingvistika kaj por la esperantologia aspektoj). En la doktoriga komisiono sidis i.a. prof. *HAASE* de la Universitato de Bamberg, Germanio. La 283-paĝa disertacio estas verkita en la nederlanda lingvo kaj proponas resumojn en la angla, Esperanta kaj germana lingvoj. Temas pri la dua disertacio pri E-rilata temo defendita en nederlanda universitato ene de unu jaro (post *Marcus SIKOSEK*, doktoriĝinta en novembro 2006 post esploro pri la historio de UEA), sed pri la unua disertacio post 1947(!), kiu rekte koncernas la lingvon mem. Estas antaŭvideble, ke la Universitato de Amsterdamo baldaŭ nomumos *JANSEN* plenrajta speciala profesoro en la katedro, kiun li de 2004 okupas en la nomo de IEI. La teksto de la disertacio estas libroforme aĉetebla ĉe IEI kontraŭ EUR 25,20.

*laŭ informoj de Atilio ORELLANA ROJAS*

## Norvegio

*Jon RØMMESMO* mortis pro kancero, 84-jara, la 1an de aŭgusto, en sia hejmo apud la lago Tyrifjord, Norvegio.



Li estis la verkinto de pluraj libroj por komencantoj: norvega Lernolibro, kiu formis bazon de kurso dissendita de pluraj lokaj radistacioj kaj poste afiŝita en Interreto; facila Legolibro; kaj libreto en la norvega pri la lingvo kaj ties historio. Li ankaŭ fervore aktivis kiel gvidanto pri la interreta kurso *Esperanto Viva*. Krome li tradukis i.a. „Norvegaj popolfabeloj” kaj ilustris la libreton per propraj desegnaĵoj – ĉar li estis kapabla desegnisto kaj pentristo kaj tiun fakon li ankaŭ instruis.

Kun siaj tri filoj – kaj poste kun sia nepo – li konsekvence parolis en E-o, kaj tiu sperto rezultigis la kajerojn *Esperanto ABC*, *Fantaziaĵoj* kaj alian E-materialon por infanoj. Malgraŭ malsano li aktivis ĝis la fino.

*Arne Olav MJØEN*

## Pollando

A) La aŭtuna sesio de la Interlingvistikaj Studoj (14-21.09.2007) en Poznań atendis la partoprenantojn kun pli riĉa programo ol kutime, ĉar en la tria jaro de la studoj okazas specialiĝo, ĉi-foje pri komunikado, lingvistiko kaj lingvopedagogio. *István ERTL* prelegis pri la nuntempa E-literaturo kaj analizis kelkajn verkojn. La kurso de *Claude PIRON* pri psikologiaj aspektoj de komunikado katenis la atenton de la aŭskultantoj. *Ilona KOUTNY* prezentis lingvistikajn aspektojn de komunikado. Enkadre de la lingvopedagogia specialiĝo *Katalin KOVÁTS*, prizorganto de la elstara instruista retejo *edukado.net* enkondukis la partoprenantojn al la bazaj faktoroj de lingvoinstruado. *Maria MAJERCZAK*, metodikistino de la Jagiellona Universitato en Krakovo, traktis metodikon. Al la programo kontribuis ankaŭ *Zsófia KÓRÓDY*, vicprezidanto de ILEI.

La nuna sesio estis specifa, ĉar la lingvopedagogia specialiĝo realiĝis en la kunlaboro de UAM kun ILEI, kaj pro tio povis aliĝi ankaŭ kromaj partoprenantoj (7 personoj el 4 landoj). La kunordigita instruista trejnado daŭros unu jaron (kun reta konsultiĝo inter la sesioj). Tiuj ĉi kursanoj sekvis krome minikurson pri literaturo (*István Ertl*) kaj pri movadhistorio (*Aleksander KORĴENKOV*) kaj povis aŭskulti donace la aliajn proponitajn kursojn de la Interlingvistikaj Studoj.

*laŭ la informoj de d-rino Ilona KOUTNY, gvidanto de la Studoj*

\*\*\*

B) En la kadro de Internacia Ekonomia Forumo, kiu okazis de 6-8 septembro 2007 en Krynica, viciĝis prelegaro pri E-o rilata al la Forumo temo „Eŭropa Unio – krizo kaj ŝancoj de la lingva komunikado”.

La prelegantoj estis: d-ro *Seán Ó RIAIN* (moderatoro, IE), Prof. *Reinhard SELTEN* (DE), d-rino *Barbara DESPINEY* (FR), d-rino *Aida ČIŽIKAITĖ* (LT), Prof. *Witold STĘPNIEWSKI* (PL), *Etsuo MIYOSHI* (JP). La Nobelpremiito profesoro Reinhard SELTEN prelegis tri fojojn: por ĝenerala publiko, por junaj aktivuloj kaj por esperantistoj. Lia Teorio de Ludoj pri eksperimenta ekonomio rilatas al diversaj terenoj de la vivo: eksperimenta ekonomia analizo, industria organizado, socia, politika, interhoma konduto, negocoj, al prognozo de financoj, monopoloj, centraj bankoj, al administrado, biologia evoluo kaj militistara strategio. Dum la lingva parto oni diskutis pri taŭgeco de E-o kiel „lingva ponto” en lernado de fremdaj lingvoj kaj grandega ŝparo de tradukokostoj. Dum la Ekonomia Forumo oni parolis ankaŭ pri la lerneja instruado de E-o en la Eŭropa Unio.





Sur la foto (de maldekstre): Łukasz ŻEBROWSKI, Seán Ó RIAIN, Etsuo MIYOSHI, Eduardo KOZYRA, Václav HAVEL, Peter BALÁŽ (fone), Tobiasz KAŹMIERSKI  
*laŭ d-rino Jolanta KIERES*

## Rusio

19-22 aŭgusto 2007 enkadre de Rusiaj E-Tagoj (RET) ĉe la Azova maro en la urbeto Primorsko-Aĥtarsk (RU) okazis instru-metodika seminario „Flugiloj de malfacila vento“, kiu estas projekto de E@I kaj ILEI por komencantaj instruistoj de E-o kaj instruemaj esperantistoj. La gramatika parto de la seminario estis gvidata de *Paŭlo MOJAJEV* (UA), kiu jam dufoje kunordigis kaj kungvidis la seminarion dum IJK en Kovrov kaj Zakopane, kaj de *Aleksander OSINCEV*, kiu partoprenis la trejnseminarion “Gvidu la Flugilojn...” dum la ĉi-jara Ago-Semajno (Pollando) kaj ĉi-foje staĝis kiel gvidanto de la metodika parto. *Irina GONĈAROVA* (Rusio), la ĉefkunordiganto de la projekto, helpis kiel observanto.

La seminarion partoprenis 11 personoj, 10 el diversaj urboj de Rusio kaj 1 el Ukrainio. La gramatika parto enhavis malfacilaĵojn de la E-gramatiko kaj gramatikan ekzercadon. Dum la metodika parto oni pridiskutis diversajn

metodojn de lingva instruado, planadon de leciono kaj kurso kaj specifajojn de E-instruado. La seminario konsistis el 4 metodikaj kaj 4 gramatikaj poduhoraj programeroj dum 4 tagoj. Dum la tria tago okazis prezentoj de diversaj E-metodoj fare de spertaj E-instruistoj: *Aleksander MELNIKOV* (RU), *Mikaelo LINECKIJ* (UA), *Slavik IVANOV* (RU), *Paŭlo MOĴAJEV* (UA) kaj *Irina GONĈAROVA* (RU). Dum la 4-a tago la partoprenantoj mem prezentis siajn 15-minutajn lecionojn. Ĉiujn kondiĉojn de partopreno plenumis 5 personoj, kiuj poste ricevis atestilojn kun rekomendo kiel instruistoj de Esperanto. Ĉiuj partoprenantoj iĝis membroj de ILEI.

*Aleksander OSINCEV, kunordiganto kaj metodika gvidanto*

## **Ukrainio**

Internacia scienca konferenco okazos inter la 10-a kaj 12-a de aprilo 2008 kun la temo *Interago de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo*. Organizantoj: Ministerio pri Klerigo kaj Scienco de Ukrainio; Volinia Nacia Universitato, Lesja Ukrainka Filologia Fakultato, Fakultato de Romana kaj Ĝermana filologioj, Fakultato de Eksterlandaj Rilatoj. La ĉefaj temoj de la konferenco:

- Uzado de etnaj lingvoj por internacia komunikado en EU kaj la najbaraj landoj;
- Interago de la ukraina lingvo kaj internaciaj lingvoj;
- Planita(j) lingvo(j) kiel internacia komunikilo;
- Ŝtata(j) lingvo(j) kaj oficiala(j) lingvo(j); dulingveco, plurlingveco;
- Prioritataj kaj minoritataj etnolingvoj;
- Gepatra lingvo en lernado kaj edukado;
- Lingvo kaj la etna kulturo, beletro;
- La lingvaĵo de amaskomunikiloj;
- Literatura lingvo kaj sociaj, regionaj variantoj;
- Aktualaj problemoj de la tradukado;
- Atingoj de la eŭropa leksikografio;
- Kompilado de lingvaj komputilaj datumbazoj.

Estas planita ronda tablo pri „Etnaj stereotipoj en internacia kaj interpopola komunikado”. Ĉiuj eŭropaj lingvoj kaj E-o estos uzataj kiel laborlingvoj. La materialoj estos publikigitaj en la scienca revuo de Volinia Nacia Universitato antaŭ la konferenco. La aliĝilon (familia nomo, persona nomo, posteno, scienca grado, laborloko, en kiu lingvo vi prelegos kaj en kiuj lingvoj vi parolas, adreso, kontaktaj telefonnumeroj, retpoŝto, bezono de

loĝloko) kaj la tekston de la prelego bonvolu sendi ĝis la 31-a de decembro de 2007 al la adresoj:

– UA-43021 Lucjk, str. Vinniĉenka, 30<sup>a</sup>, Katedro pri la Ukraina Lingvo, eldonaj aferoj kaj redaktado, tel.+38 (3322) 4-84-12, <phyllological@univer.lutsk.ua> al *Nina DANILJUK* (baltaj, slavaj lingvoj kaj E-o);

– UA-43025, Lucjk, prosp. Voli, 13, Katedro pri Aplikata Lingvistiko, tel. +38. (3322) 4-73-58, <r-g-phyllology@univer.lutsk.ua> al *Marija OLIKOVA* (romanaj kaj ĝermanaj lingvoj);

– UA-43021, Lucjk, str. Vinniĉenka, 28, Katedro pri Eksterlandaj Lingvoj, tel.+38 (3322) 4-92-72, <int-rel@univer.lutsk.ua> al *Nadija PETROVSJKA* (romanaj kaj ĝermanaj lingvoj).

Pri la postuloj (amplekso, formato, referencmaniero, sendmaniero, akompanaj informoj kaj strukturo) de la artikoloj, aliĝkotizoj kaj ceteraj detaloj demandu la sekciestron de ILEI-UA.

*laŭ informoj de Nina DANILJUK*

## **La 42-a konf. de ILEI, Maribor, Slovenio, 2009**

La konferenco okazos antaŭ la 94-a UK (Bjalistoko, PL). Estas planataj unusemajna konferenco kaj dutaga komuna vojaĝo al la UK post la konferenco kun ekskurso kaj tranokto survoja. Diversaj ebloj ankoraŭ estas esplorataj kaj pliaj informoj aperos en sekva IPR kaj la retejo de ILEI.

Antaŭ la konferenco estas antaŭvidata antaŭkonferenca ekskurso por vojaĝemuloj, kiuj ŝatas kombini feriojn kun plia esperantumado. Slovenio havas multajn vizitindajn lokojn. Ĉe la marbordo estas karsta provinco Kras kun multaj karstaj fenomenoj. Famaj estas karstaj kavoj: Kavoj de Postojna kaj Kavoj de Škocjan, kiu estas en la listo de la protektata monda heredaĵo de UNESCO. Famaj estas ankaŭ la lago de Bled kaj lago de Bohinj. Multaj riveroj kaj riveretoj donas refreŝiĝon dum somero, kaj tiu akva riĉaĵo ebligas al la loĝantaro sufiĉe agrablan kaj aktivan vivon.

Certe agrablaj estos ankaŭ la dumkonferencaj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj, ĉar Maribor situas en la koro de Mezeŭropo, en la tranĉpunkto de gravaj transportaj vojoj, kiuj iras el meza al la sudorienta Eŭropo kaj el la okcidenta Eŭropo al la Panonia malaltaĵo. Maribor kuŝas ĉe la rivero Drava, kie intertuŝiĝas kvin diversaj provincoj: la transporte kaj energi-provize grava *Drava valo*, la brutbredista kaj turisma *Pohorje*, la arbara kaj agrokultura *Kozjak*, la vinbera kaj fruktarbara *Slovenske gorice*, kaj la

plantaĵkultura *Dravsko polje*. Tia situo difinis al la urbo gravan rolon en la pasinteco kaj ankaŭ hodiaŭ, kaj verŝajne eĉ pli en la estonteco.

Mariboranoj jam organizis en 1994 la 16-an REF, en 1995 SAT-kongreson, en 2004 Lingvan festivalon, en 2007 EEU-kongreson, ĉiujare Printempan renkontiĝon, kiu estas internacia aranĝo kaj ekde 2006 ankaŭ „Kaŝtanan piknikon“ en la lasta semajnfino de oktobro. Tio klare indikas, ke la faka programo de la konferenco certe estos riĉa kaj bunta. Ĝia priskribo sekvos poste. Do, ni promesas al vi belan kaj agrablan kuneston en la urbo ĉe bordo de la rivero Drava. Ni invitas Vin elekti ILEI konferencon kiel unu el la eblaj antaŭkongresoj.

**Postkongresu en Afriko kun E-instruistoj kaj plie E-umadu!**

## **LA 41-A KONFERENCO DE ILEI 29 julio – 5 aŭgusto 2008, Portonovo (Benino)**

*“Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero”*

*Karaj gekolegoj instruistoj kaj instruantoj,*

Vi ĉiuj estas tutkore invitataj partopreni la 41-an ILEI-konferencon en Afriko, en la kontinento, kie ankoraŭ ne okazis grandaj internaciaj E-eventoj. Ne nur ĉeestu tiun gravan eventon, sed ankaŭ interŝanĝu spertojn kun niaj afrikaj samideanoj, kontribuu al la disvastiĝo de nia lingvo en tiu ĉi parto de la mondo. Priskribo pri la konferencaj kondiĉoj jam aperis en IPR 3/07 kaj pliaj informoj aperos en la retejo de ILEI ([www.ilei.info](http://www.ilei.info)). Se Vi havas demandojn, sugestojn, proponojn, bv. skribi al la Estrarano pri Konferencoj ([aidute@mail.lt](mailto:aidute@mail.lt)).

Se Vi ne povas veni persone kaj ĉeesti la konferencon fizike, ni ege petas Vin subteni la konferencon per financa helpo por subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj instrukapabligadon de junaj instruemuloj el Afriko al la konto de ILEI ĉe UEA (ilek-a) aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko „Benino 2008“.

Sed pli bone, se Vi plenigos la aliĝilon en <http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php> aŭ sendos paperan aliĝilon al estrarano de ILEI: *Aida Čižikaitė Kapiniū 11-15, LT-50198 Kaunas, LITOVIO* kaj mem partoprenos la unuan grandan internacian E-aranĝon en la historio de Afriko.

**ĜIS REVIDO EN PORTONOVO!**

*Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero*

Ĉiu aliĝanto uzu apartan aliĝilon, fotokopion aŭ samformatan paperon. Bv. tajpi aŭ skribi preslitere per latinaj literoj. La plenigita aliĝilo bv. sendi al *Aida Ĉiĝkaitė, Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, LITOVIO.*

Prefere uzu la retan aliĝilon: <http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php>.

FAMILIA NOMO ..... VIRO/VIRINO  
(por alfabeto ordigo) ..... (forstreku unu)

PERSONA(J) NOMO(J).....

NASKIĜDATO: jaro..... monato..... tago .....

ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo) .....

LANDO ..... TEL N° (kun prefikso) .....

FAKSO.....RETADRESO .....

PROFESIO/FAKO .....

ĈIONMANGANTO / VEGETARANO/ SPECIALA .....

(forstreku nebezonaĵajn kaj/aŭ aldonu bezonojn)

*Se Vi bezonas vizon aŭ invitilon por veni al Benino, bonvolu turni Vin al Jean Codjo, ESPERANTO-AFRIK, jean\_codjo@yahoo.com, esperantaf@firstnet.bj, 03 BP 3589 Cotonou (BENIN).*

Mi aliĝas al la Konf. laŭ la kondiĉoj presitaj en la kongresa informilo kaj en tiu ĉi aliĝilo, kaj sendis mian pagon (pageblecoj en IPR 07/3) al ILEI je..... (dato).

Mi konsentas, ke miaj datumoj: poŝta adreso, retadreso, numeroj de telefono, fakso, portebla telefono kaj naskiĝdato aperu en konferenca libro. ....jes / ne

DATO ..... SUBSKRIBO .....

Mi pretas prezenti ..... lingvon en la Lingva Festivalo *jes/ne.*

Rilate al la konferenca temo mi proponas prelegon kun titolo: .....

Mi proponas por la ĝenerala konferenca programo: .....

Mi proponas la jenan kontribuon al la distra programo .....

(la proponoj kaj resumoj devas atingi la Estraranon pri Konferencoj nepre ĝis 2008.03.15)

Por lingvoprezento aŭ prelegoj mi bezonas: .....

Por aliaj prezentotaj programoj mi bezonas: .....

Apartaj bezonoj .....

Mi volas diri / informi pri .....

**ALIĜKOTIZO** (vd.IPR 07/3 p.36. aŭ <http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php>)

..... **RESTADO** ( loĝado kaj manĝoj inkluzivitaj)

- en 1-lita ĉambro (klimatizilo, duŝejo, necesejo) .....
- en 1-lita ĉambro (ventumilo, duŝejo, necesejo) .....
- en 2-lita ĉambro (klimatizilo) .....
- en 2-lita ĉambro .....
- en 3-lita ĉambro .....
- en 4-lita ĉambro .....
- Tuttaga ekskurso (tra Portonovo) TT .....
- Duontaga ekskurso (al Adjarra) DT1 .....
- Duontaga ekskurso (Aguegues) DT2 .....
- Duontaga ekskurso (al Dangbo) DT3 .....
- Duontaga ekskurso (al Bimyns) DT4 .....
- Postkonferenca 4-taga ekskurso PE .....
- Bankedo .....
- Aliĝkotizo .....
- Aldona krompago pro malfruaj mendoj .....
- **Kontribuo al konferenco en Afriko 2008** .....
- Fonduso „Dazzini” .....
- Koleghelpa Fonduso .....
- Fonduso „Erika Linz” .....
- Fonduso „InterKulturo” .....
- Fonduso „Szerdahelyi” .....
- Donaco .....
- Bankkostoj .....
- ENTUTE (en eŭroj) .....

Mi mendas tranokton ekde la ..... ĝis la ..... en .....

Se vi mendas dulitan/plurlitan ĉambron, bv. indiki, kun kiu vi dividas la ĉambron .....

Bv. indiki ĉi tie kiu(j)n ekskurso(j)n vi mendas .....

Por mendoj atingantaj nin **post la 1-a de majo 2008** oni devas aldone pagi 10 % de sumo por menditaj servoj. **Post la 1-a de junio** ni ne povos mendi al Vi tranoktojn.

Mi aliĝas kiel: [ ] membro de ILEI [ ] ne membro de ILEI

[ ] junulo — naskiĝinta post la 31-a de decembro 1977.

[ ] handikapulo, ĉu ILEI jam havas atestilon?..... *Jes / mi kunsendas*

Mi sendis mian pagon al:

[ ] ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante: "ILEI-Konferenco", nur se vi pagas ĝis la 15-a de majo 2008;

[ ] la bankokonto de ILEI en Svedio: IBAN: SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6,00 EUR por svedaj bankokostoj se vi pagas de ekster Eŭropa Unio. El Svedio eblas pagi al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Förenings-sparbanken.

Via aliĝo validas nur post kiam la Kasisto ricevis vian pagon. Kiel aliĝdato validas la dato en kiu via pago atingis la konton de ILEI.

## LABORKOMISIONOJ

**Ekzamena:** Probal Dasgupta (prez.), Boris Grigorjevič Kolker (vicprez.), Reza Torabi (sekr.), Mireille Grosjean, Julián Hernández, Jorge Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze

**Elekta:** Tiekō Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute

**Kontrolo:** Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman

**Lerneja:** Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tiekō Isikawa, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi

**Regulara:** Marija Belo?evi?, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas

**Terminara:** Ma?ro La Torre, Miroslav Malovec

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**EEU:** *E?ropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärsvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, [cantskog@kolumbus.fi](mailto:cantskog@kolumbus.fi)

**E@I** (*Esperanto ?e Interreto*, [www.ikso.net](http://www.ikso.net)): faka sekcio de **TEJO** ([www.tejo.org](http://www.tejo.org), po?tadreso ?e UEA).

**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*):

Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, [esperanto@Education.monash.edu.au](mailto:esperanto@Education.monash.edu.au)

**IEI:** *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

**TEJO:** Observanto de TEJO ?e ILEI: **François Hounsounou** (adr. sur p. 40., Benino).

**UEA:** *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. [www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto de ILEI ?e UEA:

**Radojica Petrović**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ?e ILEI: **Claude**

**Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**

**UNESKO** (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, *quai de la Loire*, FR-75019

*Paris*, [francois.lojacomo@wanadoo.fr](mailto:francois.lojacomo@wanadoo.fr); **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux*, FR-05500 Benevent et Charbillac, [monique.arnaud@tiscali.fr](mailto:monique.arnaud@tiscali.fr); **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets*, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88, [mireille.grosjean@rpn.ch](mailto:mireille.grosjean@rpn.ch)

## MEMBRI? O AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (la? UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fonda?oj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio*. Tel.: (+46 21) 41 70 45, [sjoerd@esperanto.se](mailto:sjoerd@esperanto.se).

La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ?e UEA, a? al la sveda konto.

\* Pagoj al konto de ILEI ?e UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (?enerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

\* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ?e Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 e?rojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster E?ropa Unio.

\* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona pa?oj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ?e la Komerca ? ambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

Hejmpa?o de ILEI: <http://www.ilei.info>

## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*.

**Presado:** Flandra Esperanto Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen*, tel.: (+32-3)-234 34 00.

**Redaktejo:** NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5*. Rete: <[jozefonemeth@yahoo.com](mailto:jozefonemeth@yahoo.com)>.

<http://www.ilei.info/ipr/>; tel.: (+36-89) 356-050. La revuo aperas anka? kasede registrita por leghandikapuloj.

Informas: Rob MOERBEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <[r.moerbeek@wanadoo.nl](mailto:r.moerbeek@wanadoo.nl)>.

## SEKCIOJ

**Albanio:** Vasil Pistoli,  
c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq  
Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana,  
*selimibardhyl@yahoo.com*

**A?stralia:** Penny Vos,  
14 Candelo St, AU-2550 Candelo  
NSW, *penivos@yahoo.com*

**Belgio:** Iwona Kocięba,  
Graaf de Fiennesln 54, BE-2650  
Edegem, *iwona.kocięba@telenet.be*

**Benio:** François Hounsounou,  
BP 226 BJ-Lokossa-Mono, Rep du  
Benin, West Afrika,  
*hounfranc@yahoo.fr*

**Brazilo:** Antonio Felix da Silva,  
Rua Engenheiro Francisco  
Azevedo, 243, Sumarezinho - São  
Paulo - SP, BR-05030-010,  
*geinstruistoj@ileibr.org*

**Britio:** Teller Angela,  
10 Marina Gardens, GB IP11 2HW  
Felixstowe, Suffolk,  
*angela@esperantoeducation.co.uk*

**?e?io:** Jana Melichárková,  
CZ-696 02 Ratíškovice 938,  
*melicharkova@quick.cz*

**?inio:** vakas

**Danio:** Arne Casper-Mortensen,  
Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100  
Kobenhavn, *arnecasper@dbmail.dk*

**Finnlando:** Carola Antskog,  
Dragsfjärdvägen 690, FI-25700  
Kimito, *cantskog@kolumbus.fi*

**Francio:** Michel Dechy,  
65 allée de la crémaillère,  
FR-59650 Villeneuve d'Ascq,  
*michel\_dechy@hotmail.com*

**Germanio:** Zsófia Kóródy,  
E-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-  
37412 Herzberg/Harz,  
*zsofia.korody@esperanto.de*

**Hungario:** József Németh,  
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász,  
*jozefo.nemeth@gmail.com*

**Irano:** Hamzeh ?afii,  
P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran,  
*hamzeh@esperanto.org*

**Italio:** Luigia Oberrauch Madella,  
via Prampolini 8,  
IT-43100 Parma,  
*silkovojo@aliceposta.it*

**Japanio:** Isikawa Tiekko,

103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama  
JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-  
mansion.com*

**Katalunio:** Pedro M. Martin  
Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2,  
ES-17300 Blanes,  
*pmarti10@xtec.cat*

**Korea Resp.:** CHO Sung Ho,  
Department of Biology, Inha  
Universitato, Incheon KR-402-751,  
*shcho@inha.ac.kr*

**Kroatio/KEJ:** Marija Jerković,  
Jarunska 6, HR-10000 Zagreb,  
*mjerkovic@net.hr*

**Kroatio/KEU:** Ivan Bekavac-  
Basić, Ku?lanova 59, HR-10000  
Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

**Kubo:** Marta Alonso Gutiérrez,  
Malecón 659 entre Belascoain y  
Gervasio; CU-10200 Ciudad de La  
Habana, *kubesp@enet.cu*

**Nederlando:** Atilio Orellana  
Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585  
HW Den Haag, *tei001@tiscali.nl*

**Norvegio:** Anne-Karin Bondhus,  
Gjerdeveien 157, NO-4028  
Stavanger, *akbondhus@c2i.net*

**Pollando:** Piotr Nosek,  
ul. Zbrojów 10/8, PL-30 042  
Kraków, *piotr.esp@gmail.com*

**Rumanio:** Mihai Trifoi, Str.  
Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116  
Bixad/Jud. Covasna,  
*trifoi@honoris.ro*

**Rusio:** Irina Gon?arova,  
Moloeznaja 38-10, Odincovo 2,  
Mosk. obl. RU-143000,  
*mirina@online.ru*

**Svedio:** Siv Burell,  
Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41  
Graabo, *s.burell@telia.com*

**Svislando:** Mirelle Grosjean,  
Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les  
Brenets, *mireille.grosjean@rpn.ch*

**Togolando:** Attiogbe-Agbema-  
don B., Mensah, T.I.E.To, B.P.  
13169, Lome-TOGO,  
*esp.togo@cafe.tg*

**Ukrainio:** Nina Daniljuk,  
prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-  
26, UA-43026,  
*nina\_daniljuk@ukr.net*

**Usono kaj Kanado:** Doroteo  
Holland, 5140 San Lorenzo Dr,

Santa Barbara, CA 93111-2521  
(US), *dorothyh77@gmail.com*

**Venezuelo:** Andrés Turrisi,  
Cen.Res.Puerta del Este Torre,  
Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid,  
VE-1070 La California Norte,  
Caracas, *andesp@internet.ve*

## REPZENTANTOJ

**Armenio:** Lida Elbakjan,  
Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062  
Erevan, *LIDELB@freenet.am*

**Barato/Hindujo:** Venkatesh Reddy,  
No. 216, Off main Road, Whitefield,  
Bangalore 66, Karnataka,  
*esperovr@yahoo.co.in*

**Bosnio kaj Hercegovino:** Nimeta  
Kulenovi?, Branica Sarajevo 15/V,  
BA-71000 Sarajevo

**?ilio:** Héctor Campos Grez,  
Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

**Estonio:** Helgi Hromova,  
Pk. 623, EE-12602 Tallinn

**Islando:** Loftur Melberg Sigurjónsson,  
Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður,  
*loftur@skyr.is*

**Israelo:** Gian Piero Savio,  
13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim,  
*saviogp@zahav.net.il*

**Kongo DR:** Nangu Nduantoni-  
Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaire

**Kostariko:** Hugo Mora Poltronieri,  
Apartado 4981, CR-1000 San José,  
*tikoguau@gmail.com*

**Litovio:** Algimantas Piliponis,  
Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius,  
*piliponis@centras.lt*

**Meksiko:** José de Jesús Corrales C.,  
Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe,  
Durango, Dgo.  
*jdjcorrales@yahoo.com.mx*

**Nov-Zelando:** Gwenda Sutton, 12C  
Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-  
6001 Wellington 1,  
*gwenda.s@ihug.co.nz*

**Portugaliao:** João José Santos,  
Fonte Velha, Cx. 3003 PT-7100-078  
Estremoz, *joaojosesantos@gmail.com*

**Serbio:** Radojica Petrović,  
Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 ? a?ak,  
*radp@ptt.yu*

**Slovenio:** Marija Zlatnar-Moe,  
Mili?inskega 66, SI-1000 Ljubljana,  
*Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

**Uzbekistano:** Eugeno S. Perevertajlo,  
Abon. jashik 140, Po?tamt,  
UZ-700000 Ta?kento, CIS,  
*esperuzo@mail.ru*